


Granda Kurlo

# Ĉendancaj baladoj



Maje 2017

## < Enhavo:

13'	'20 & Al la Esperantisto:	4
7'	'19 & Amikoj, fratuloj:	6
3'	'6 & Araneo kaj vesperto:	8
5'	'14 & Balado pri maltima formiko:	8
20'	'60 & Bresta balado:	10
3'	'8 & Ĉe kuracisto Zamenhof:	15
32'	'102 & Davida balado:	16
5'	'13 & Dekdumejla arbar':	24
6'	'21 & Esperantisto, Ekesto kaj Malapero:	25
13'	'49 & <i>Ebe Skamelido</i> :	26
5'	'12 & Feina sorto:	30
10'	'29 & Festeno:	32
10'	'25 & Haralda balado:	34
5'	'13 & Hermes kaj la lignohakisto:	36
2'1/5	X & Interkona balado:	38
12'	'36 & Iva balado:	39
4'	'6 & <i>Ĥolera kanto</i> :	42
3'	'6 & Karoto kaj rozo:	43
7'	'18 & Kampulo kaj korniko:	44
3'	'8 & <i>Kampulo kaj edzino</i> :	46
5'	'13 & Karinjeto:	46
3'	'11 & Korniko kaj ĉasisto:	48
5'	'16 & La glorkanto al UEA:	48
3'	'6 & <i>La ĉevalo kaj la azeno</i> :	50
3'	'10 & La oreloj de la leporo:	51
5'	'12 & La simio kaj la delfeno:	52
4'	'10 & Lidja balado:	53
7'	'23 & Majkanto la malnova:	54
4'	'5 & Marista lulkanto:	55
6'	'8 & <i>Major' Brak'</i> :	56
4'	'7 & Maristo kaj junulino:	57
3'	'7 & Murdist-Andrev:	58
4'	'7 & Oh, rajdis, rajdis:	59
17'	'56 & Petro sinjor' kaj Elinborg':	59
8'	'20 & Prefere silenti ol fie paroli:	64

2'	'6 & Pri nia kor'...:	66
3'	'12 & Sven en Rozgarden':	66
2'	'5 & Testamento de l' etulino:	67
84'	'258 & Valdemara balado:	68
3'	'7 & Vi min trompis:	88

Sume 40 baladoj kun '858 strofoj daŭrub 339' minutoj = 5½ horoj. Inter ili estas **10** ŝercaj kaj **21** tradukitaj baladoj. *Kvin* titoloj staras en vicordo neĝusta (nealfabeta).

## ***Baladojn dancu feroe!***

Balada ĉendanco bezonas lokon kun bona akustiko, milde varmkolora lumo kaj libera planko prefere ligna. Space sufiĉas unu kvadrata metro por persono.

Stora Tuna, Svedajo, aŭtune 2016

Martin.Strid@gmail.com,

+ 46 - 703 152 615



***<http://tretis.tone.se/pag.php?kio&lng=eo>***

## & Al la Esperantisto:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 1300 paŝoj dum 13 minutoj. Kvar poemojn kaj unu dediĉon verkis L. L. Zamenhof (, &1 kaj , &2 en Unua Libro por Rusoj, 1887; , &3 en La Esperantisto n-ro 1, 1889; , &4 en Plena lernolibro de la tutmonda lingvo "Esperanto" por Rusoj, 1890; rekantaĵon ĉe foto pri la unua Kongreso de Esperanto en 1905). Baladigis Martin Strid (2017) per islanda melodio.

*(# A Sprengisandi: /La do La do LaTi doTi La do;  
Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti; La do La do LaTi  
doTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti;  
(#Rekantaĵe: mi mimi fa fafa fa fafa fa mi; re rere  
re dodo do dodo Ti Ti; mi mimi fa fafa fa fafa fa  
mi; re rere re dodo do TiTi La La a))x20 )+*

(&:

### , &1. Mia penso:

'1 /Sur la kampo, fo2r de2 l'  
mondo, ; Antaŭ nokto de2  
so2mero, ; Amikino e2n la2  
rondo ; kantas kanton pri2 l'  
e2spero.

(×: **(Kion disigis ne unu  
miljaro ; Tion kunigis  
Bulonjo ĉe l' Maro ;)**x2)

'2 Kaj pri vivo detruita ; Ŝi  
rakontas kompatante, - ; Mia  
vundo refrapita ; Min doloras  
resangante. ....

'3 "Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, ;  
Kial tia senmoveco? ; Ha,  
kredeble rememoro ; El la kara  
infaneco?" ....

'4 Kion diri? Ne ploranta ;  
Povis esti parolado ; Kun  
fraŭlino ripozanta ; Post somera  
promenado! ....

'5 Mia penso kaj turmento, ;  
Kaj doloroj kaj esperoj! ; Kiom  
de mi en silento ; Al vi iris jam  
oferoj! .....

'6 Kion havis mi plej karan - ;  
La junecon - mi ploranta ;  
Metis mem sur la altaron ; De la  
devo ordonanta! .....

'7 Fajron sentas mi interne, ;  
Vivi ankaŭ mi deziras, - ; Io  
pelas min interne, ; Se mi al  
gajuloj iras... ..

'8 Se ne plaĉas al la sorto ; Mia  
peno kaj laboro - ; Venu tuj al  
mi la morto, ; En espero - sen  
doloro! .....

## **,&2. Ho mia kor':**

'9 Ho mia kor', ne batu  
maltrankvile, ; El mia brusto  
nun ne saltu for! ; Jam teni min  
ne povas mi facile (; Ho, mia  
kor'!)×2

'10 Ho mia kor'! Post longa  
laborado ; Ĉu mi ne venkos en  
decida hor'! ; Sufiĉe!  
trankviliĝu de l' batado, (; Ho,  
mia kor'!)×2

## **,&3. Al la "Esperantisto":**

'11 En bona hor'! Ni aŭdis la  
signalon, ; Kaj batalame saltas  
nia koro, ; Konduku nin,  
komencu la batalon ; Sub bona  
stelo, en feliĉa horo! .....

'12 Amikoj de proksime,  
malproksime, ; Salutas vin, ho  
nia luma stelo! ; Konduku nin  
senhalte kaj sentime ; Al nia  
granda, sankta, glora celo! .....

'13 Ne tre facila estos nia vojo ;  
Kaj ne malmulte ankaŭ ni  
suferos, ; Sed batalante kun plej  
granda ĝojo ; Senhalte ni  
laboros kaj esperos. ....

'14 For estas jam la baroj de l'  
komenco, ; L' unua muro estas  
trarompita, ; Kaj dolĉa estos nia  
rekompenco, ; Kiam la celo  
estos alvenita! .....

## **,&4. La Espero::**

'15 En la mondon venis nova  
sento, ; Tra la mondo kuras  
forta voko; Per flugiloj de facila  
vento ; Nun de loko flugu ĝi al  
loko.

'16 Ne al glavo sangon soifanta  
; Ĝi la homan tiras familion : ;  
Al la mond' eterne militanta ;  
Ĝi promesas sanktan  
harmonion. ....

'17 Sub la sankta signo de l'  
espero ; Kolektiĝas pacaj  
batalantoj, ; Kaj rapide kreskas  
la afero ; Per laboro de la  
esperantoj. ....

'18 Forte staras muroj de  
miljaroj ; Inter la popoloj  
dividitaj: ; Sed dissaltos la  
obstinaj baroj, ; Per la sankta  
amo disbatitaj. ....

'19 Sur neŭtrala lingva  
fundamento, ; Komprenante  
unu la alian, ; La popoloj faros  
en konsento ; Unu grandan  
rondon familian. ....

'20 Nia diligenta kolegaro ; En  
laboro paca ne laciĝos, ; Ĝis la  
bela sonĝo de l' homaro ; Por  
eterna ben' efektiviĝos. .... )

## & Amikoj, fratuloj:

< Ripete 16 sed rekante 5 el 32 batoj por strofo, entute 628 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4440. El sveda tradukis Martin Strid (2015).>

(#: a;Mi /Mi MiMi /La LaLa /Mi FaSo /Fa a;Fa /MiMi  
MiMi /ReRe ReDi /LA DiMi /Re; DiRe /Mi i /Fa a;  
/MiRe ReDi /Mi i;Mi /MiMi SiLa /Tildo TiLa /SiLa  
Tido /La) ×19 )+

(&:

'1 A/mikoj, fra/tuloj kon/sili2s  
/sin ; /kiel fornup/tiĝu ĉi/jare  
fratu/lin'. ; En la /ro/zo ;  
kon/sili2s /sin ; /kiel  
fornup/ti2ĝu ĉi/jare fratu/lin'.

'2 "Volas al vi doni ni (:  
reĝfilon por edz' ; li havas pli  
da or' ol riĉa Roland da  
terpec'.")

(×;: **En la rozo** ;) (: reĝfilon  
por edz' ; li havas pli da or' ol  
riĉa Roland da terpec'.)

'3 Sabate kaj dimanĉe eliris  
mesaĝ' ; lunde kaj marde  
spektiĝu la omaĝ'. .....

'4 Merkrede kaj ĵaŭde miksiĝis  
da vin' ; vendrede kaj sabate  
drinkiĝis je kulmin'. .....

'5 Ili drinkis dum tagoj, ili  
drinkis dum du ; ne volis  
novedzino iri al la litsitu'. .....

'6 Ili drinkis dum tagoj, ili  
drinkis dum tri ; ne volis  
novedzino vidi al la litlini'. .....

'7 Tiam envenis malgranda  
mara bub' ; kaj estis li vestita en  
blua la jup'. .....

'8 Ekstaris li ĉe tablo kaj tiel  
diras ; "Mi vidas nur la mastojn  
kiuj tie iras. ....

'9 Mi vidas nur la mastojn kaj  
bluajn kaj brunajn ; kaj riĉa  
Roland mem sur tio staras  
tribune." .....

'10 Kaj ili ĉiuj lasis tiujn  
vortojn pasi for ; sed la junulino  
tenis la vortojn en memor'. .....

'11 Emas junulino eliri tra la  
pord' ; kaj kuras ŝi la vojon al  
mara la bord'. .....

'12 Ŝi kuris sur ŝtonoj kaj sur  
piedfingroj ; sed bone sin gardis  
de bluaj ondadingoj. ....

'13 Kaj ili prenis en ŝipon ŝin ;  
invitis ŝin trinki da medo kaj  
vin'. .....

'14 "Dio min gracas de infanetoj  
; mi fermis la pordon kaj for de  
tie tretis." .....


'15 "Mi vidas sur via eta blanka fingro ; ke tie ĝis hieraŭ ne estis nuptoringo." .....

'16 "Mi vidas sur via orflavaj haroj ; ke tie ĝis hieraŭ ne nuptokrono staris." .....

'17 "Mi vidas je via neĝblanka mam' ; ke ili ne konsolis al iu etinfan'." .....

'18 Sidiĝas junulino ĉe Rolanda flank' ; ne sentas ŝi malĝojon, ne sentas ŝi da mank' .....

'19 Kuŝiĝas junulino ĉe Roland intime ; vekigis ne antaŭ ol en sepreĝa reĝimo. .... )



## & Araneo kaj vesperto:


< Ripete 23 sed rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 186 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

*(#: <:31> (/LaLa dore; mimi mido; rere reTi; LaLa LaMi; LaLa dore; mimi mido; rere reTi;*

*(#Rekantaĵe: La La; mimi miso mimi rere reTi LaLa Mi; mimi miso mimi redo rere reTi La a)  
)×6 )+*

(&:

'1 (': Scivolemis por la certo ;  
araneo) ĉe l' vesperto:



(,: Scivolemis por la certo ;  
araneo)

(×:; tiel. ; Tretu en la danco, ;  
drume draŝu paŝa spur'. ;  
Dume noktaj bestoj dormu en  
la nesto nur.)

'2 Ŝajnas al mi tre mistere, ; ke  
vi dormas kap-al-tere! .....

'3 Povas doni vi en digno ; la  
klarigon de l' enigmo? .....

'4 Via reto, araneo, ; savas vin  
de la pereco: .....

'5 Pro l' tag-nokto intermita ;  
ĉio iĝas renversita. ....

'6 Por korekti la malordon ; la  
vespertoj - faras tordon! .....

## & Balado pri maltima formiko:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 518 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4497. Verkis kaj komponis Stefan Demert (1970). El sveda tradukis Martin Strid (2011) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2015).>

*(#: (/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa re; SoSo rere fafa rere; SoSo dodo mimi do; dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;))×14 )+*



(&:

'1 /Mi sonigi volas liron ;  
kvankam estas nur gitar' ; kaj  
rakonti serĉan iron ; de formiko  
al pinglar'.

(×:; **Dancu per la ses piedoj ;  
Dancu paŝon post la paŝ' ;  
Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne  
metu ĝin en maŝ' ; Dancu  
paŝon post la paŝ'.**)



'2 Li matennebulen kuris ; post  
fortrink' de ĉokolad' ; vakcinian  
vepron spuris ; ĝoja en kontenta  
sat'. .....

'3 Estis longa vojo lia ; vagi al  
proksima pin', ; malaperis de l'  
aliaj ; tamen ĝoja tenis sin. ....

'4 Kvindek metrojn de la nesto ;  
ĝuste dum la sunsubir' ; li  
pinpinglon trovis restan ; tute  
laŭ sia dezir'. ....

'5 Por ĝin levi li per forto ;  
devis streĉi sin kun pen' ; kaj  
komencis la transporto ; de la  
bela pinglo jen. ....

'6 Post kvar horoj da cirkulo ;  
venis al bierbotel', ; ĉion vidis

tra nebulo, ; brusto balgis pro  
anhel'. .....

'7 Ĝin sabate iu ĵetis ; Mi  
seniĝos je soif' ; pensis li, la  
ŝargon metis ; kaj engrimpis en  
l' edif'. .....

'8 Li fortrinkis lastan guton ; el  
biera katafalk' ; kaj sin batis  
kiel bruto, ; kriis He mi estas  
alk'. .....

'9 Eĉ ne pinglon mi hejmtiros ;  
ne, nun estos da perturb' ; el  
arbaro mi foriros ; ĥaosigos en  
la urb'. .....

'10 Sed li tien ne alvenis ; baris  
io sur la pad' ; la formikon halto  
ĝenis ; pro giganta barikad'. .....

'11 Ĝi teruris al rigardo, ; estis  
granda griza mas' ; la formiko  
vokis Ardon, ; se malhelpas vi  
al pas'. ....

'12 Li atakis ĝin kolere ;  
etenditan en la vast' ; sed  
fiksiĝis malliberen ; kvazaŭ en  
glueca past'. .....

'13 Triste finas nun ĉi kanto ;  
per formika streba bat' ; sed lin  
tenis la giganto ; ĝis li mortis  
pro malsat'. .....

'14 Alkoholon ne impliku ;  
spita vi inertos dum ; se  
naskiĝis vi formiko ; ne batalu  
kun maĉgum'. .... )

## & Bresta balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1740 paŝoj dum 20 minutoj. Norda Kantaro #4408. El feroa tradukis Martin Strid..>

(<:29> /doTi re3do doTi Ti; La3La LaaLaMi La; LaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire do; (#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a))x60 )+

(&:

'1 /Frue estis en maten' ; suno ruĝas en mar' ; Bejno budon eniris ; al Bresto, dorma kar'.  
(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 "Ekstaru Bresto, mia frato ; suno ore brilas ; blovas neniu vento sur ondo ; kaj maro nun trankvilas. ....

'3 Serĉu iron al Etan Dujmo\* ; bordo ne ŝaŭme blankas ; pli neniam bonis tago ; kapti ŝafojn mankajn." ....

'4 Ŝnurojn prenis kaj rimenojn ; zone fiksas glavojn ; malsupren al strando iris ; postsekvis du knaboj. ....

'5 Diris Sigmund Brestofilo\* ; li naŭ vintrojn aĝis ; "Iros mi al Eta Dujmo ; vidi ŝafojn sovaĝajn." ....

'6 Respondis Toro Bejnofilo ; dek du jarojn plenis ; "Patro, iru vi al Dujmo ; lasu min kunveni!" ....

'7 "Kion vi sur Dujmo farus ; mallarĝas grimpopadoj ; kaj profundas rokabismoj ; vi malaltas, knaboj." .....

'8 Respondis Sigmund Brestofilo ; kreskis en konkludo ; "Kiu kreskas ĉe cindro ene\* ; taŭgos malmulte ludon\*." .....

'9 "Veron li diras mia filo", ; Bresto ekis vortojn: ; "Neniu malhelpu bravan ; menson de junforto." .....

'10 Prenis boaton el densa nesto ; maro al ili ĝemis ; knaboj sidiĝis en la poupon ; kaj estroj ekremis. ....

'11 Al insulo ili eniris ; teren tiris boaton ; kaj antaŭen suriris monton ; kun krutega pado. ....

'12 Piedviglaj kaj ungfiksaj ; nenion malkuraĝas ; vigle kuras rokfalrandon ; preni ŝafojn sovaĝajn. ....

'13 Kvincent ŝafoj sur insulo ;  
Eta Dujmo restis ; nigris ĉiuj  
karbaturfe ; speco konata estis.

.....

'14 Rapidaj kiel sovaĝaj birdoj ;  
en printempalveno ; oni diras ke  
hvalbanoj\* ; ĉiajn specojn  
prenis. ....

'15 Ŝajnas al mi kolerige ; tia  
gregdetru' ; unuajn ŝafojn en  
Ferooj ; ŝatus mi vidi plu. ....

'16 Tute bone taŭgis estroj ;  
sovaĝŝafojn ĉasi ; iris al boato  
malsupren ; kun kaptaĵo pasi.

.....

'17 Tenis\* antaŭen al Granda  
Dujmo\* ; hejmingon celis ;  
vidas tri fortikajn ŝipojn ;  
kontraŭ ili veli. ....

'18 Da kirasoj tri dekduojn ;  
prue nombris ili ; glimas lancoj,  
oraj kaskoj ; glavojn suno brilis.

.....

'19 Bresto diris vortojn tuj ;  
bonis li valora ; "Bone konas mi  
la velojn ; kaj drakpruon\* oran.

.....

'20 Aŭdu Bejno, mia frato, ;  
kiel nin konsili? ; Tiuj estas  
viroj kiuj nin ; volas malutili.

.....

'21 Unue velas Havgrimo ; kaj  
Geŭta\* Trondo due ; antaŭ ol  
trihora\* fino ; ni anhelos skue.

.....

'22 Unue velas Havgrimo ; laste  
velas Bjarno ; pre\* ol sun' en  
maron sidas ; sangos nian feron  
karno." ....

'23 Baldaŭ tuŝos tajdmarflun\*  
; misas la destin' ; Rektrokon  
atingos ni ; kaj venos en Ravin'.

.....

'24 Venos ni en pado supren ;  
povos ĝin defendi ; hakos la  
heroojn kiuj ; volas vundojn  
vendi." ....

'25 Al tio respondis Bejno forta  
; li bone saĝis mem ; "Ni nin  
tenos ĉe insulon ; kaj prenos  
duran remon. ....

'26 Tenu al venonta kabo! ;  
Atingeblas tero ; ne sin laŭdos  
ili ke ; facilis la konkero!" ....

'27 Tenis ili al insulo ; poste  
militŝip' ; du videblis vete remi  
; blankis ŝaŭma vip'. ....

'28 Brakoj ruĝas, vizaĝoj ruĝas  
; forte tendenoj ŝvelas ; remiloj  
kurbas, remingojn turbas ;  
ŝaŭmon pruo pelas. ....

'29 Akre enŝprucis boatrando ;  
okcidenta vento ; trafo sur  
malflusan ŝtonon\* ; rompis  
boatbendon. ....

'30 Sigmundo kaj Toro junaj ;  
ne malfruaj ekis ; kuris ili sur la  
teron ; Bresto kaj Bejno sekvis.

.....

'31 Iris ili al la roko ; kiuj sciis  
grimpi ; supren levis do la  
knabojn ; kaj metis ilin simple.

.....

'32 "Aŭdu, Bejno, mia frato! ;  
Staros jen batalo. ; Kelkaj  
Helon\* alveturos ; antaŭ nia  
mortfalo! .....

'33 Prenu vi la sudan flankon ;  
alte eblas firmi ; staros norde  
mi, kaj tie ; malfacilas ŝirmi."

.....

'34 Havgrimo kaj kampul-  
Bjarno ; rokon iras antaŭen ;  
Trondo kun siaj sekvoŭfraŭloj ;  
bordon\* vagas ĉirkaŭen. ....

'35 Provi volis fortaj knaboj ;  
rapide ataki ; fratoj akre kaj  
masakre ; sangoflue hakis. ....

'36 Fratoj sciis glavojn flegi ;  
ludon bone konis ; ruĝiĝis  
kirasoringoj\* ; palon al vangoj  
donis. ....

'37 Fajro fumis el glaveĝoj ;  
ŝtalon ŝtalo klakas ; korpoj falis  
kvin malsupren ; cerbo roke  
flakas. ....

'38 Bejno hakis morten duujn ;  
trian forta Bresto ; puŝis for  
aliajn ĉiujn ; ĝojis ne moleston.

.....

'39 Tiam Havgrimo koleris ;  
turnis sin al Trondo ; "Kial vi  
malflusaŝafe ; vagu strandon  
ondan? .....

'40 Tial al vi mi teron donis ; ke  
vi batalu klinge ; kial vi lasas,  
kaj tuta trupo ; glavojn pendi  
inge?" .....

'41 Ruza estis Geŭta Trondo ;  
respondo ne mankis lin ;  
"Multan vi havemas teron ; por  
pelte kovri vin! .....

'42 Vi heroo nomu vin ; stulta  
vi estas prave ; vi ne povas per  
du dekduoj ; sur du viroj  
venkon havi! .....

'43 Vi rikoltu triston, mokon ;  
kaj longe ĝin ricevos ; trupo  
kuris al du viroj ; kaj fantomi  
devos. ....

'44 Se vi inter viroj validu ; kaj  
ne mankas em' ; iru rokon vi  
unue ; kaj montru taŭgon  
mem!" .....

'45 Koleriĝis Havgrimo ; preter  
la maltimo ; kuris kontraŭ  
Bresto supren ; kun lanco en  
proksimo. ....

'46 Lanco glitis en talion ; ŝtalo  
femurprofundon ; Bresto faris  
finan trukon ; sentis  
mortigvundon. ....

'47 Premis li sin sur pikon plu ;  
gambo sangon lanĉis ; hakis  
forte Havgrimon ; ŝultron,  
brakon detranĉis. ....

'48 Morta falas Havgrimo ; kaj  
Bresto super lin ; Bejno luktis  
vire lerte ; tamen falis fine. ....

'49 Toron fluis larmo vange ;  
duriĝis Sigmund kore ; "Ni ne  
ploru, ho fratul" ; sed kaŝu  
bonmemore!" ....

'50 Tretas Trond sur batalejo ; li  
vortojn bone lasis ; "Venkas ne  
en ĉiu vintro ; en Valhal\* pli  
bonas ĉasi. ....

'51 Sperti devas ĉi herooj ; iri  
Bifrosten\* for ; morti devos ĉiu  
homo ; sed ne lia glori. ....

'52 Eblas ne ke luktan ludon ;  
fermas fino jama ; knabojn  
prenu ni por sendi ; al la vojo  
sama." ....

'53 Svejno ingan glavon tiras ;  
Bjarno diras en rapido ; "Ŝajnas  
min fiago hunde ; mortigi  
homidojn. ....

'54 Devus knaboj ja ricevi ;  
pacon inter viroj." ; Multaj ŝatas  
Bjarnajn vortojn ; sed Trond  
alio diros. ....

'55 "Saĝa homo antaŭatentas ;  
knabojn haku sen graco! ;  
Kreskos ĝis luktuloj ili ; al ni ne  
ofertos pacon." ....

'56 Koleriĝis Bjarno tiam ;  
"Estu vi maltotem!"\* ; Ne  
mortigu vi la knabojn ; ol min  
prefere mem!" ....

'57 "Tio ne estis mia volo" ;  
Trondo vortriparas ; "Mi nur  
volis provi kie ; via penso  
staras. ....

'58 Manĝon ofertas mi al ili ;  
kaj aliajn favorojn ; mem  
edukos ilin mi ; instruos leĝojn  
kaj morojn. ....

'59 Instruos sporton kaj  
armludojn ; poemojn kaj  
rakontojn." ; Ĉiuj bataleje  
starantoj ; ŝatis nun ruĝan  
Trondon. ....

'60 Estrojn ili nun honore ;  
kampe enterigis ; Trondo kun si  
prenas knabojn\* ; kaj norden al  
Geŭto navigis. .... )



### <& Klarigoj (\*) al Bresta balado:

'3 Eta Dujmo (Lítla Dímun), neloĝata feroa insulo krute alta.

'5 Sigmundur Brestisson naskiĝis en jaro 0961.

'8 Ĉe cindro, ĉe fajrejo en domo. ; Ludo: aktivaĵo, vigla faro ĝenerale.

'14 Hvalbo estas plej norda vilaĝo de feroa Sudinsulo.

'17 Teni, direkti ŝipon. ; Granda Dujmo, trioble pli granda insulo norde de Eta Dujmo.

'19 Drakpruo, ornamo de militŝipo en formo de draka skulptaĵo.

'21 Geŭto, vilaĝo sur feroa Orientinsulo. ; Trihora: "økt" estas okono de tagnokto.

'22 Pre = tempe antaŭ.

'23 Kelkloke maro fluas okcidenten aŭ orienten kaj ĉirkaŭ ĉiun sesan horon tiu fluo inversas direkton.

'29 Malflusa ŝtono dum malfluso malprofundas aŭ eĉ superas akvosurfacon.

'32 Hel estas diino de regno de morto.

'36 Kirasoj korpaj konsistas el kunkudritaj ferringoj.

'50 Valhalo estas la halo de dioj kaj mortintaj herooj.

'51 Bifrost estas ĉiela vojo al Valhalo, ankaŭ ĉielarko.

'56 Maltotemo: La originalo havas na "vargur í ve", tio estas, lupu en oferejo. Tio signifas iun kiu murdis aŭ alimaniere krimegis en sankta pacejo, ĉu templo ĉu parlamentejo, kaj kiu tial meritas nek respekton nek protekton de leĝo.

'60 Trondo edukos la knabojn. Toro restos ĉe li, sed Sigmund plenkreska iros ĉe norvegan reĝon Olaf Tryggvason kiu donos al li taskon kristanigi Feroojn. Pri tio rakontas aliaj baladoj. >

## & Ĉe kuracisto Zamenhof:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Cezar "por karikaturo de la desegnisto Eder Benedetti". Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#: <:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi  
mimi mido re fa; (#Rekantaĵe: mire do do3mi mimi re  
do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re  
do) )x8 )+

(&:

'1 "/Doktoro2 mia, kuracisto! ; Ĉu estas ĝi inflam' de histo? (×:; **En la ĉen', dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 Jubile mi la tagojn startas. ; Doktoro, ĉu mi bone fartas? .....

'3 Mi krevos tuj pro energio. ; Sukcesas al mi simple ĉio. ....

'4 Subite plenas mi de ĝojoj, ; kurante saltas mi sur vojoj!" .....



'5 Doktoro Zamenhof  
rigardas: ; "Jen verda koro  
sankte ardas." .....

'6 Kun ĝojo la doktoro diras, ;  
ke ne malsano lin inspiras. ....

'7 "Amik', vi estas tute sana, ;  
serĉado plua estus vana. ....

'8 Ne estas ja malsana tristo. ;  
Vi iĝis nur esperantisto!" .....

## & Davida balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2958 paŝoj dum 32 minutoj. Verkis Martin Strid (2015, 2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414. Klarigojn (\*) vidu post la strofoj.>

(#: <1,6:29> (/mi mire redo dodo; dodo dore mi; mimi mire mire mimi; soso fami mi; (#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o))x102 )+

(&:

### ,& Unua parto:

'1 /David\* raportis iras ; kaj fieras li. ; En sekretarejo diras : ; "Estimata Ci,

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Universala Esperanto- ; Asocio kongresos. ; Edinburge en Skotlando\* ; helpon mi promesos. ....

'3 Tiel ili min akceptos ; kiel kamaradon ; kaj al postenoj min elektos ; en sia movado." ....

'4 "Lingvo Esperanto minacas ; anglan avantaĝon. ; Tial nepre ni senlacaj ; kaŭzu al ĝi damaĝon. ....

'5 Ĝian movadon ni penetros ; – jes, vi ricevos pagon – ; kaj ni havas buntan paletron ; da detruaj agoj." ....

'6 Kongresan komitaton gvidis ; lokan Ĝon Ŭelso\* ; kaj la

junularan prezidis ; David Kelso. ....

'7 Ŭelso postulis debaton kun ; Brita Konsilio\* ; pri meritoj de la angla ; kaj esperanto-defio.

....

'8 Brito kaj franco tie portretis ; po lingvon kaj germano\*. ; En esperanton interpretis ; la grafo\* UNO-ano. ....

'9 Brita debatisto\* parolis ; pli kaj pli komplike ; kvazaŭ li per tio volis ; fiaskon komunike.

....

'10 Fine Ŭelso mem transprenis ; alesperantan tradukon. ; Al li la vortoj rapide venis, ; brilis jena truko. ....

'11 Pruvi per sia truko li provis ; anglan eleganton, ; sed kongresanoj male trovis ; ke fuŝigas ĝi parolanton. ....

'12 Li la homojn konvinki klopodis ; pri anglalingva



valoro, ; sed ilian fidon erodis ;  
ĝia vortrigoro. ....

### **,& Dua parto:**

'13 En brita espa oficejo ;  
Herbert\* laboras ; sed respondi  
al leteroj ; neniam al li valoras.  
.....

'14 Ron\* diris: "Kia ideo, ;  
Esperanto frenezas." ; Tamen  
male al Kabeo\* ; li landan  
estraron pezis. ....

'15 Esperanton Haroldoj  
subtenas ; ĉefministro\* kaj  
lordo\* , ; ambaŭ en espan  
lobion\* venas, ; tra malferma  
pordo.

'16 "Esperanton parlamentanoj ;  
apogas jam plej multe" ; Ian\*  
mesaĝis\* iom rikana ; sed tio  
estis stulte. ....

'17 Parlamente membre ŝvelas ;  
Esperanto-Lobby. ; Nomon  
ĝian Ron forŝtelas, ; tion  
Herbert aprobis. ....

'18 La nomon li por si registris ;  
per asocia mono. ; Tion Herbert  
administris ; sen bezona  
ordono. ....

'19 Ron en sekretarejo salutas ;  
"Kion de Ci mi aŭdas? ; Cia  
ĉefo pri risko ne mutas: ; Oni  
esperanton laŭdas." .....

'20 "Esperanto jam tro kreskas ;  
diras ĉefo mia, ; kaj ni havas  
taskon groteskan, ; Harold estas  
fia. ....

'21 Trafos la imperion tristo ;  
pro lia rego, ni certas." ; "Ĉu ke  
li estas komunisto ; ĉefo Cia\*  
avertas?" .....

'22 "Diras ĉefo Cia tion ; ke  
ĉefministro Haroldo ; sekvi  
rifuzas la linion ; de usona  
soldo. ....

'23 Malobean regon haroldan ;  
gazetaro buĉos ; per  
propaganda kampanjo skolda ;  
alie fariĝos puĉo." .....

'24 Cia kredigis al Petro Ĝusta\*  
; ke devos li komploti. ; Lia  
lojalo, iom rusta ; ne plu  
patriotis. ....

'25 Leteron de Harold lorda ;  
publikigas gazeto\* ; kiom da  
parlamentanoj akordas ; en  
esperanto-reto. ....

'26 Ron kunvokis la espan  
skipon ; kaj ŝaltis  
magnetofonon:\* ; "Harold,  
gratulon!" diras tipo, ; "Via  
letero bonas!" .....

'27 Sed neniam Harold skribis ;  
tiun leteron publikan. ; Iu do  
kontraŭ li intrigis ; nombron  
komunika.....

'28 Ĉar tute novis tiu nombro;  
ili eĉ ne sciis mem. ; Kaj kaŝite  
restas en ombro ; kiu verkis  
teme. ....

'29 Ambaŭ Haroldoj demisiis ;  
por eviti tumulton. ; Tio tragike  
travestiis ; demokratian  
rezulton. ....

### **,& Tria parto:**

'30 Braŭnli\* testamenton faris ;  
"Mian domon duonan ; al brita  
esperantistaro ; heredaĵe mi  
donas." .....

'31 Sekretario Vilĉjo\* legi ; la  
testamenton petas ; sed kasisto  
Nora\* neis ; dirante "Ĝi  
sekretas." .....

'32 Sekretario Vilĉjo akuzas ;  
"Vi trompas pri testamento!" ;  
Nora respondis: "Ni rifuzas ;  
montri la dokumenton!" .....

'33 Sekretario Vilĉjo verda ;  
diris en aĝo maljuna ; "Mi  
konstatis ke monon perdas ; ni  
pro Nora bruna. ....

'34 Tiu heredaĵo neniam ; la  
asocion venas ; kaj sekreta  
agento jam ; la monon de ni  
forprenas." .....

'35 Anglaj sekretaj agentoj  
ŝtelas ; posedojn de l' movado ;  
kaj iliajn trukojn rivelas ; tiu ĉi  
balado. ....

### **,& Kvara parto:**

'36 Asocion prezidas  
Edmundo\* . ; Mi ses\* lin bone  
konas. ; Venos tempo por  
malabundon ; kredigi en  
Londono. ....

'37 David\* sekretarejon venas ;  
kaj ordonojn ricevas. ; "Bone,  
Mi ses, mi komprenas ; kion  
fari ni devas." .....

'38 "Esperanton vi subfosu ; en  
granda kaŝo. ; Komencu per  
estigi ĥaoson ; en organiza  
maŝo. ....

'39 Ho, miseto, nun aŭskultu: ;  
Vi kaj la prezidanto ; nian  
revizoron konsultu ; pri l' domo  
de Esperanto. ....

'40 Vi kaj prezidanto Edmundo  
; kun intenco nuba: ; seniĝu je  
la domo kaj grundo ; ke manku  
hejmo kluba. ....

'41 Domon vendi li proponu, ;  
kvazaŭ tro ĝi kostas, ; kaj la  
vendenspezon donu ; por  
senutilo poste. ....

'42 Esperantasocion supoze ;  
devus vi malfondi ; kaj akuzojn  
serioze ; neniam respondi." .....

'43 Ĝojs\* , la kasistino nova, ;  
kontojn refaris. ; Ekde tiam  
neniu trovas ; kiom ni jam  
ŝparis. ....

'44 "La kasistajn jarraportojn ; ni ne plu povas legi ; ĉar plenas je sensencaj vortoj\* ; anstataŭ klaron regi. ....

'45 Sumon de nia kapitalo ; ĝi nenie informas ; kaj tabeloj paĝojn vualas, ; papera stako enormas. ....

'46 Ĉu malaperis kapitalo? ; Kion pri nia domo? Kiel eblas valorfalo? ; Kredas neniu homo! ....

'47 Ĉu ĉi tiu revizoro\* ; diras al ni honeste? ; Ĉu li pravas pri valoro ; aŭ trompas nin investite? ....

'48 "Domon vendu!" diras estraro, ; "ĉar tro multe kostos, ; kaj post tiu saĝa faro ; ni malpli impostos." ....

'49 Oni la domon tuj forvendis ; post la seniĝa decido\* ; kvankam anstataŭan endis ; havi jam en vido. ....

'50 Dungos direktoron estraro\* ; por organiza disvolvo ; kiu la perdon dum lastaj jaroj ; per esploro solvos. ....

'51 Tamen ili ne pretis varbi ; kiam iu demandis\* ; kaj motivo nigre karbis ; dum ili plu marĉandis. ....

'52 "Translokiĝu," Derek\* proponas, ; "mian kolecion ; Ŭeĝuudon en Barlastono. ; Por ni bonos tio." ....

'53 "Derek sidas ĉe ambaŭ flankoj ; de la negoca tablo," ; diris juĝisto, " – lojalo-mankoj ; kaŭzos malagrablon." ....

'54 Ili subite postulis: "Najbaru ; al Barlastono l' dungoto."\* ; Tamen poste postenon preparis ; al fore loĝanta skoto. ....

'55 Ili Davidon Kelson dungis ; per la doma enspezo. ; Li la novan kontrakton jungis ; per troa jura pezo: ....

'56 David ne laboris pri faktoj ; nek pri disvolvaj ŝtupoj. ; Pri Ŭeĝuuda domkontrakto ; li sin okupis. ....

'57 Fine la domkontrakto estis ; preskaŭ naŭdekpaĝa ; kvankam la juristo protestis ; "Tiom ne estas saĝa!" ....

### **,& Kvina parto:**

'58 Por anglespoj Viljam\* olda ; redaktas informilon. ; Ambaŭlingve skribas heroldo ; ankaŭ por krokodiloj. ....

'59 Ek de kiam Paŭlo\* transprenis ; ĝin, ĝi ne plu informas ; pri esperanto nek angle venis ; – propagando dormas. ....

'60 Por edukado lingva faris ;  
bonan laboron ulo\* ; sed  
daŭrigon David baris. ; El ĉio  
fariĝis nulo. ....

'61 Kelkaj esperanton anas ; eĉ  
en la estraroj ; bele babile  
ĉarlatanas ; sed fakte nenion  
faras, ....

'62 krom se iu vere volas ; por  
Esperanto agi. ; Ili kontraŭ tiu  
parolas ; kaj povas minace sagi.  
.....

'63 "Monon uzu por kurso!"  
proponas ; Husajn'\* al  
jarkunsido ; de l' esperanto-  
klubo londona ; kiun David\*  
prezidas. ....

'64 Proponon trakti ne volis  
dornulo ; kaj pri bagateloj ;  
okupis tempon manipule ; je  
malŝpara celo. ....

### **,& Sesa parto:**

'65 Esploris Iano  
senmembriĝon ; malkaŝo jam  
survojas. ; Uelso defende sian  
prestiĝon ; diris: "Vi  
paranojas!" ....

'66 Tutan tempon dum ses  
monatoj ; Ian esploris ; pri la  
kontoj kaj monrilatoj ; por  
vereco fervoris. ....

'67 Dum la lastaj ses jaroj ; de  
la jarmilo dua ; la kasistaj

financdeklaroj ; estis  
malkongruaj. ....

'68 Laŭ la nova kontosistemo ;  
donacoj estas perdo ; kaj la  
kasisto kun trompa emo ;  
raportis finanĉan merdon. ....

'69 Dum la estraro plendis ; ke  
mone minuso regas ; el la  
kontoj evidentis ; La kapitalo  
kreskegas! ....

'70 Kion Ian eksuspektis ;  
precize diagramis ; kion ni eĉ  
ne konjektis ; Nin perfido  
jamis! ....

'71 Dek du esplorraportojn ; Ian  
konsciencie ; al Ĝon kun  
klarigaj vortoj ; liveris  
konfidence. ....

'72 Ĉar Ĝon prezidanto estis ;  
de la asocio ; kaj por li la tasko  
restis ; gvidi ĝin tra tio. ....

'73 Ian realon pruvis grafike ;  
Falsas deficito. ; Sed kripligis  
nin jena piko ; Domo jam  
vendita. ....

'74 Tuj al Ian minacoj venis ; de  
estraranoj. ; Ili lin en kunsido  
ĝenis ; per moko kaj rikanoj.  
.....

'75 Plendis kasisto pri la  
konduo ; de Ian post raportoj ;  
David\* bojis kiel bruto ; per  
maldecaj vortoj. ....

'76 Trans la tablo David blekis:  
; "Ian, vi fekulo!" ; sed ke ili  
mensoge pekis ; kvazaŭ fariĝis  
nulo. ....

'77 "Ĝon, vi estas perfidanto," ;  
Ŭelson Ian akuzas ; "ĉar  
malaperis mona kvanto ;  
kvankam neniu uzis." ....

'78 Espoj vendrede  
jarkunvenis\* ; atakoj al Ian  
mavas\* ; sed la membroj fine  
komprenis ; ke li ja pravas. ....

'79 Post la kunveno homoj  
miris: ; "Ĉu nun Ĝon Ŭelso ;  
demisios ĉar konspiris ; aŭ ĉu  
David Kelso?" ....

'80 Kelkaj el ili saĝe konkludas:  
; "Nun Ĝon flanken paŝos ; pro  
falsaro honte nuda ; aŭ sin  
Kelso kaŝos." ....

'81 David Kelso malaperis ; en  
la sekva lundo\*. ; Li movade  
malsinceris ; mankis honesta  
fundo. ....

### **,& Sepa parto:**

'82 Ĉu vi konas markon  
sekretan ; de Londona polico? ;  
Por provoki estas preta ;  
aktivulan vicon. ....

'83 Marko en agogrupo loka ;  
mem la gvidon prenis ; kaj  
parolis krimprovoka ; ĝis  
policianoj venis. ....

'84 Planis verda grupo proteston  
; kontraŭ karbenergio. ; En  
lerneja ĉambro modesta ;  
diskutis la strategion. ....

'85 Marko proponis: "Tuj ni  
rompu ; energiejan barilon!" ;  
sed ne sukcesis ilin trompi ; per  
perfida konsilo. ....

'86 Ili intencis pace protesti ;  
kontraŭ karbenergio. ; Venis  
polico por aresti ; antaŭ la  
demonstracio. ....

'87 Ĉiujn oni enkarcerigis ;  
krom la elokventan ; kiu provis  
al krimo instigi ; ĉar estis li  
agento. ....

'88 Ilin en jura proceso akuzis ;  
oni je saboto ; sed koramikinon  
konfuzis ; de Marko identa foto.  
....

'89 "Trovis lian mi pasporton ;  
sub alia nomo. ; Advokato,  
aŭskultu vorton: ; Esploru tiun  
homon!" ....

'90 Skandalon advokato  
malkaŝis ; kaj en juĝejo diris ;  
akuzisto retropaŝis ; ĉiuj homoj  
miris. ....

'91 La trukon televido rivelis ;  
kaj publikigis\* ; kiel agentoj  
detruis celis, ; kontraŭ popolo  
intrigis. ....

'92 Ankaŭ tiuj estis verduloj ; kvankam ekologiaj ; kiuj civitanajn postulojn ; demonstracias. ....

'93 Marko kontraŭ kultura juno ; domon detruis\* , ; sed lin oni neniam punos ; ĉar polico influis. ....

'94 Krimis li por registaroj , ; eĉ en aliaj landoj , ; sed pri incendiaj faroj ; neniam juĝisto demandos. ....

'95 Same kiel agentoj aliaj ; li eĉ amrilatis ; al viktimoj siaj ; dum li movadon gvatis. ....

'96 Marko Kennedy pentis vorte ; ke li tro perfidis. ; Davidon Kelson, kvazaŭ mortan , ; plu ni neniam vidis. ....

'97 En demokratia lando ; rajtu la popolo ; siajn celojn propagandi ; malgraŭ rega volo. ....

'98 Se sekreta servo ŝtata ; popolmovadon sabotas ; tiam tiuj aŭtokratoj ; morale jam bankrotas. ....

'99 Perfiduloj sin preparas ; por detrua tasko ; cele kaj sisteme faras ; ke esperanto fiasku. ....

'100 Ni naivaj esperantistoj ; eĉ ne povas imagi ; ke konataj homoj insiste ; trompe kapablas agi. ....

'101 Se decido nova efikas ; kiu ne havas sencon ; jenan faras anglamerika ; mondon rega potenco. ....

'102 Atentu pri sekreta servo ; en via organizo ; kaj vi havu fortajn nervojn ; en penetra krizo. .... )

### **<& Klarigoj (\*) al Davida balado:**

'1 David Kelso, estrarano de Esperanto-Asocio de Britujo (EAB) pri edukado 2002-2010.

'2 En jaro 1971 Universala Kongreso de Esperanto estis en Londono kaj Internacia Junulara Kongreso en Edinburgo.

'6 John Wells, dufoja prezidanto de EAB.

'7 British Council.

'8 Rezentantoj de British Council, Alliance française kaj Goethe Institut. ;

*Ĉendanĉaj baladoj*

Le Compte de la Gatinari, profesia interpretisto en Unuiĝintaj Nacioj.

'9 McMillan.

'13 Herbert Platt, kompania sekretario de Brita Esperanto-Asocio (BEA, poste EAB) en la 1970-aj jaroj.

'14 Ron Coverson, estrarano de BEA. ; Kazimierz Bein, pionira verkisto en esperanto.

'15 Harold Wilson, ĉefministro de Britujo 1964-1970 kaj 1974-1976 ; Harold Davies, parlamentano en brita

Malsupra Ĉambro 1945-1970, ek de tiam en Supra Ĉambro, nobeligita als Lord Davies of Leenk. ; Esperanto Lobby, premgrupo en brita parlamento al kiu post naciaj elektoj anis pli multaj parlamentanoj ol al iu ajn el la partioj.

'16 Ian Fantom, informa oficisto de EAB en 2003 kaj estrarano pri esplorado 2005-2006. ; Gazetara bulteno.

'21 Centra Inteligentuma Agentejo, usona spionorganizo.

'24 Peter Wright, eksa ĉefo de sekreta serva oficejo MI5, rakontis en intervjuo kiel kaj kial li, preparante puĉon, elpostenigis la ĉefministron.

'25 La leteron publikigis la gazeto The Guardian.

'26 En la kunveno partoprenis grupo da anglespoj. La magnetofono aŭdigis surbendigitan parolon telefonan.

'30 John Brownlee, sekretario de EAB.

'31 Will Green, alias Vilĉjo Verda (1912-2003) sekretario de EAB. ; Nora Brown, kasisto de EAB-

'36 Edmund Grimley Evans, prezidanto de EAB. ; MI6, brita Militista Inteligentumo, poste nomata SIS, Sekreta Inteligentuma Servo.



'37 David Bissett, vico-prezidanto de EAB.

'43 Joyce Bunting, kasisto de EAB.

'47 S-ro Brookes.

'50 Dunganonco.

'52 Derek Tatton, estrarano de EAB 1999-2008 ; Wedgwood Memorial College en Barlaston, kies direktoro estis Derek Tatton.

'54 Oni postulis maksimuman distancon de 40 mejloj = 65 km.

'58 William Auld.

'59 Paul Gubbins.

'60 Graham Leon Smith.

'63 Al jarkunveno Hussain Al Amily proponis ke Londona klubo de Esperanto uzu 86 mil pundojn por kurso. ; David Thornell, prezidanto de Londona espa klubo.

'75 Kelso.

'91 La skandalon pri agento Mark Kennedy raportis la 14-an de novembro 2011 brita televida kanalo Channel 4.

'93 Marko Kennedy ebligis polican sturmon de Domo de Junularo en Kopenhago la 1-an de marto 2007. Kelkajn tagojn poste oni malkonstruis tiun pli ol centjaran kulturdomon. >

## & Dekdumejla arbar':

< Ripete 24 sed rekante 8 el 41 batoj por strofo, entute 520 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4490. Popolkanton el sveda tradukis Kukoleto (-IORe) kaj modifetis Martin Strid. Klarigo (\*): '1 La dekdumejla arbaro estas Långheden, provinclima sovaĝejo inter Vestmanlando kaj Dalekarlujo.>

(#: <1,8:41> (mi /mi dodo /do remi /mi redo /Ti h;re /re Tido /reTi mido /La a /So h; /do doore /Ti ildo /LaaSo LaaTi /So h;So /dolTi dore /mido fami /re e /do h;So /dolTi dore /mido fami /re e /do o) x13 )+

(&:

'1 Do /rajdas mi /tra dekdu/mejla ar/bar'\* ; dum /dormis ja /dolĉe la a/li/aj ; /Tra lale /ra2, /trala le2 /ra ; dum /do2rmis ja /dolĉe la a/li/aj ; dum /do2rmis ja /dolĉe la a/li/aj.



'2 Kaj /rajdas an/taŭen mi /io2m /pli ; (, : ek/aŭ[das mi] so/nori sono/ri/lojn) (x; ; /Tra lale /ra2, /trala le2 /ra ;) (, : ek/aŭdas mi so/nori sono/ri/lojn ; )x

'3 Ho, /bonan ta[gon, so]no/risto2j, /vi ; por /ki[u so]no/rigas ĉi so/no/ron? .....

'4 Ni /sono/rigas por ju/nule2s /in' ; ŝi /iros en /te2ron por /dor/mi .....

'5 Kaj /rajdas mi /antaŭen /io2m /pli ; tie /staris fo/sistoj du fo/san/taj .....

'6 Ho, /bonan /tagon, fo/sisto2j, /vi ; por /kiu ĉi /tiun tombon /fo/sas? .....

'7 Ni /fosas /ĝin por ju/nule2s /in' ; ŝi /iros en /te2ron ri/po/zi .....

'8 Kaj /rajdas mi /al mia /bopatra /kort' ; [kiu] /estis an/taŭe roze /ru/ĝa .....

'9 U/nue de/mandis mi /pri ama/tin' ; kaj /poste bo/patron kaj bo/pa/njon .....



'10 Kaj /venas mi /ene2n /io2m  
/pli ; Du /staris, ŝin  
/to2mbove/stan/te .....

'11 Mi /kombas je /mia  
bel/flava ha/rar' ; kaj /volis ŝin  
/sekvi en la /tom/bon .....

'12 Kaj /la junu/linoj sin /metis  
en /rond' ; kaj /diris, e/lektu mi  
a/li/an .....

'13 Kna/bino /tia2, /ki[a est]is  
/ŝi ; en /reĝlandoj /se2p ne  
tro/ve/blas .....

## **& Esperantisto, Ekesto kaj Malapero:**

< Rekante 17 el 25 batoj por strofo, entute 525 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016).>

(#: <:23> (i;Mi /SooMiMi La Mi i;Mi SooMiMi La Mi  
i; (#Rekantaĵe: So dodo Ti La So MiMi La Mi i; So  
SoSo SoFa MiRe Do So Mi))x21 )+

(&:

'1 Ga/zetartikolo ; Aŭ varba  
parolo.

(x:; **Ek sur la tero kaj  
malapero ; Dancu ni bele en  
la kosma ĉen'**.)

'2 Favora impresio, ; Ekintereso.  
.....

'3 Lernolibro, ; Sankta vibro,  
.....

'4 Propaganda miasmo: ;  
Entuziasmo! .....

'5 Samideano, (Je via sano!) .....

'6 Kamarado, ; Va2rbado, .....

'7 I2nstruo, ; En butontruo .....

'8 Verda flago, ; Glora tago! .....

'9 Plua ŝtupo ; Nova grupo. ....

'10 Nova sento, ; Facila vento  
.....

'11 Kaj poemo ; Pri sama temo!  
.....

'12 Post hezito ; Delegito. ....

'13 Laŭ bezono ; Gazetabono,  
.....

'14 Ko2tizoj ; Kaj valizoj .....

'15 Por kongreso.;  
Miraklimpreso! .....

'16 Fraka vesto, ; Bala festo, .....

'17 Naci-kostumo, ;  
Amindumo. ....

'18 Hispanino, ; Korinklino .....

'19 Kaj esperoj, ; Amleteroj. ....

'20 Mi2elo, ; Ĉi2elo! .....

'21 E2dzino; FI3NO!! .....

## & Ebe Skamelido:

< Rekante 7 el 23 batoj por strofo, entute 1127 paŝoj dum 13 minutoj. Norda Kantaro #4484. El sveda tradukis Kukoleto (LORÉ). Duoble tradukiĝis strofoj '1 kaj '32. Klarigoj (\*): '5 Aŭf nokto = dum nun venonta nokto. '6 Teĵ = tie. '8 Jununjes = de junulino. ; Zibelo: ties luksa felo, martesita. '12 Stas = estas. '23 Lando: Nuntempe provinco. '24 Doni la manon = manskue promesi.>

(#: <:1> ((2× /LaLami sosomi /famii dodo;mi miremi  
TiTire (do '1 o; '2 oo;;Ti)? (re '1 do; '2 doo;;Ti)  
LaLaSo doree mifaa miire dodoTi La a)×49 )+

(&:

'1a /Skamelev loĝis sur Tidinsulo ; li estis kaj riĉa kaj forta ; bravajn bredis li filojn kvin, du estis malbonsortaj

(×:; **Ĉar migras ja Ebe Skamelido en sovaĝej'.**)

'1b /Skamelev loĝis sur Tidinsulo ; en riĉo kaj potenc' ; bravajn bredis li filojn kvin, kontraŭis al du providenc' .....

'2 Tri jam estas mo2rtaj ; kaj du do vivas plu ; Mi volas je vero di2ri ; ili lertas en kortum' .....

'3 Estis Ebev Skamelidov ; ĉevale selojn metigas ; "Rajdos mi al la insul' ; jununjon Luciavn viziti" .....

'4 Estis Ebev Skamelidov ; li rajdas jununjan bienon ; staras ekstere jununjo Luciav ; volvita en mustelo .....

'5 "Vi staras jen, jununjo Luciav ; volvita en mustel' ; Ĉu donos al mi vi loĝon aŭf nokt'\* ; kaj estos al mi amfidel'?" .....

'6 "Ja havos vi loĝon ĉi teĵ\* aŭf nokt ; kaj al viaj ĉevaloj manĝon ; sed mia patrino respo2ndos ; pri tiaj gastaj aranĝoj" .....

'7 "Vi iru en la do2mon ; diskuti kun mia patrin' ; Mi iros en la ŝtondometon ; por mikso je medo kaj vin'." .....

'8 "Vi sidas jen, jununjes\* patrin' ; volvita en zibel'\* ; Ĉu donos jununjon Luciavn vi ; al mi por amfidel'?" .....

'9 Estis patrino de l' ju2nunjo ; ŝi tiel respondi povas ; "Al vi mian karan filinon mi donos ; se ŝin vi plaĉa trovas" .....

'10 "Aŭskultu, eta Luci2av ; ĉu volas vi min atendi ; dum mi servas en reĝa bien' ; kaj lernas batale blendi?" .....

- '11 "Vin mi atendos dum vi2ntroj ; kaj eĉ dum vintroj du ; Vin mi atendos tioman tempon ; kiom laŭ via postul'." .....
- '12 Ebev li servas en reĝa bien' ; kaj pro oro kaj gloro ; hejme stas\* Petrev, la frato ; forlogas la amon de l' koro .....
- '13 Estis Petrev Skamelidov ; sin vestas je purpurfel' ; kaj iras en la virinejon ; Luciav eta la cel' .....
- '14 "Vi sidas jen, jununjo Luciav ; kaj kudras vestaĵojn fraĉjajn ; Ebev li servas en reĝa bien' ; li vin kaj insultas kaj kraĉas" .....
- '15 "Ja bele servas mi E2bevn ; kaj min bele servas li ; neniam li kraĉus jununjon fieran ; kaj eĉ malpli al mi" .....
- '16 "Aŭskultu nun, jununjo Luciav ; mi estu via fianĉ' ; ja helpu min ĉionpotenca Dio ; ke Ebevn mortigis tranĉ'." .....
- '17 "Se estas vero, kaj diras vi ; ke Ebevn mortigis tranĉ' ; do helpu min la eterna Dio ; vi estu mia fianĉ'." .....
- '18 Ili bakas kaj bieron faras ; preparas la nupton en kaŝo ; Ebev servanta en reĝa bien' ; prisonĝas ĉiun paŝon .....
- '19 Ebev li songĝis songĝon dum nokt ; kuŝanta en la lit' ; Matene li vekigis ; kaj diris al stala amik' .....
- '20 "Mi songĝis ke mia ruĝa mantel' ; bluiĝis je kolor' ; kaj songĝis mi ke la bona ĉevalo ; mia kuris for" .....
- '21 Respondis lia stala amiko ; vestita en ruĝa purpur' ; "Vian fianĉi2non ; forlogas alia junul' .....
- '22 Ebev metas vesta2ĵojn ; kaj vestas sin per mantel' ; kaj iras li en altan halon ; al sia graca reĝ' .....
- '23 "Ho, graca reĝo, permesu min ; hejmeniri al patra land'\* ; ĉar oni diris ke patro mortis ; kaj ter' en alies man'" .....
- '24 "Pe2rmeson havos vi ; vojaĝi al via hejm' ; Donu al mi vian manon\* ke ; vi nepre venos re" .....
- '25 Ebev feris ek de l' armeo ; vojaĝis al sia hejmland' ; veturis li al Tidinsulo ; per plej rapida pland' .....
- '26 Kiam Ebev Skamelidov ; venis al patra bien' ; ekstere ambaŭ fratinoj staras ; volvitaj en mustel' .....

- '27 "Jen staras vi, frati2noj ; volvitaj en mustel' ; Kial tiom da ho2moj ; venis al bien'?" .....
- '28 Respondis la plej ju2na ; dum vange larma flu' ; "Nia frato Petrev trinkas ; nupton kun via karul." .....
- '29 Al unu li donis orkrucon sur Brust' ; alian je ruĝora ring' ; "Salajris mi en reĝa bien' ; kaj celis al fianĉin'." .....
- '30 Ebev turnigas ĉevalon al malo ; kaj volis rajdi for ; Lin postkuris fratinoj du ; kaj petis lin resti en kort' .....
- '31 La panjo kaptis bridilon kaj tenis ; lin petis resti hejme ; Ŝi tion pentis multmilan fojon ; ke ne lin lasis rajdi .....
- '32a Ebev en domon i2ras ; salutas al ĉiuj benkoj ; Lin fraĉjo igis arĝentkruĉon manen ; kaj petis al novedzin' trinki .....
- '32b Ebev en domon i2ras ; salutas al ĉiuj gastoj ; Lin fraĉjo igis arĝentkruĉon manen ; kaj petis al novedzin' tosti .....
- '33 Ebev tostis por longa tago ; per kaj medo kaj vin' ; Ĉiu rigardo al novedzino ; larmigis vange lin .....
- '34 Venas do vespe2ro ; novedzino al lito volas ; Ebev kaj eta Luci2av ; longe ili parolas .....
- '35 Kaj diris Ebev Skamelidov ; kondukas ŝin supren al cel' ; "Ĉu memoras vi, eta Luciav ; vi ĵuris al mi pri fidel'?" .....
- '36 "Ĉiun fidelon ĵuritan de mi ; mi donis al via frato ; Dum ĉiuj tagoj de mia vivo ; mi estos patrino anstataŭ .....
- '37 "Mi ne fianĉis patrine vin ; nek je bofratino ; sed ke vi estu por mi fianĉin' ; kaj kore amatino .....
- '38 Estis Ebev Skamelidov ; li per glavo fortis ; Estis eta Luci2av ; sub liaj piedoj mortis .....
- '39 Estis Ebev Skamelidov ; li kuris en la feston ; Li estis tiom kole2ra ; kaj glavo tiritita sub vesto .....
- '40 "Novedzinon mi sekvis al lito ; ke ŝiaj songoj ĉesu ; kaj sciu vi, mia fra2to ; ke vin mi ne forgesos" .....
- '41 Estis Petrev, la fra2to ; respondis urĝe lin ; "Volonte mi vin lasos dormi ; ĉinokte kun novedzin'." .....

'42 Estis Ebev Skamelidov ; elprenis sian glavon ; Estis Petrev, la fra2to ; li mortis pro tiu sen savo .....



'43 La patron li vundis mortige ; Al panjo perdiĝis man' ; Ĉar migras ja Ebev Skamelidov ; en sovaĝeja land' .....

'44 Estis Ebev Skamelidov ; li saltas sur ĉevalon ; kaj fuĝas li arba2ren ; Lin kaŝas plej bone arbaro .....

'45 Estis Ebev Skamelidov ; iras al forĝist' ; al si forĝigas ringojn el fero ; ĉiujn el nova konsist' .....

'46 Estis Ebev Skamelidov ; katenigas manojn kaj piedojn ; Vojaĝos li pilgri2me ; kompensi siajn pekojn .....

'47 Estis Ebev Skamelidov ; siajn manojn katenigas ; kaj ili restu dum longa tempo ; ĝis ili mem rompiĝas .....

## & Feina sorto:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo.>

(#: <:37>(a;do /dodo dore doTi La;So dodo dore mimi mimi; miifafa soso somi mi;re dore doTi LaLa LaSo; (#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La))×12 )+

(&:

'1 Fe/ino vivis en la lag' ; Kun viv' soleca kaj kvieta ; Kaj al la bord' je unu tag' ; Alvenis juna vir' poeta.

(×: **Dancu soleca feino ; Venu al junula sino ; Li forlasos baldaŭ vin ; Dancu soleca feino.**)

'2 Kaj bela estis la junul' ; Kaj bukla lia brunhararo, ; Ardante brilis sorĉa brul' ; En lia nigra okulparo. ....

'3 Ekvidis ŝin la juna vir', ; Ekflamis lia kor' amema, ; Li kantis kanton pri l' sopir' ; Kaj vokis ŝin per voĉo trema. ....

'4 Solecon frostan de l' fein' ; Neniam tuŝis voĉo tia, ; Ensorĉis por eterne ŝin ; La okulparo flamradia. ....

'5 Kaj plenumiĝis ŝia sort', ; Tra l' koro boris amo-sago ; Tirate de ravanta fort' ; Sen vol' ŝi venis el la lago. ....

'6 Iliajn lipojn ama brul' ; Kunfandis. Vane vokis ondo. ; Ŝi, man' en mano kun junul', ; Ekiris al mortema mondo. ....

'7 Kaj estis por eterne for' ; Fedigno virgulina, sorĉa, ; Ŝi donis ĝin plezure por ; La ravo de la amo dolĉa. ....

'8 Kaj ne ekfloris plu narcis' ; Se lipojn ŝi por rid' malfermis, ; Ne milda flor', sed fajra kis' ; Sur ŝiaj ruĝaj lipoj ĝermis. ....

'9 Kaj se ekkaptis ŝin dolor', ; L' okuloj plu ne perlojn rulis. ; Sed vera, homa, sala plor', ; Varmega larm' en ili brulis. ....

'10 Kaj ĉiam pli kaj pli da larm' ; Elgutis al ŝi el okulo, ; Ĉar, ve, ekvelkis ŝia ĉarm', ; Kaj ŝin forlasis la junulo. ....



'11 Feinoj, estas la destin' ; Por vi kruela kaj malbrila. ; La sort'  
elekti trudas vin, ; Elekto estas malfacila: .....

'12 Fevion frostan vivi sur ; La koro kun glacia krusto, ; Aŭ en  
pasema amplezur' ; Ekvelki sur la vira brusto. .... )

## & Festeno:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 841 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroe sudinsula melodio de Drako Longa kaj disdivido na strofoj. Vortludoj (\*): '6 Homaro – france sonon h oni ne elparolas. '10 Toleremo. '13 Klasbatalo. '15 La apetito. '17 Kostas. '18 Centra. '25 Komploto. '29 Gazeto.>

(#: <:29> (#Suĉuroy: /dolSo LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo SoMi; So LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo LaSo; (#Rekantaĵo: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi La;So So LaTi do o;))x29 )+

(&:

'1 /Kunsidis por festeno,  
preteĝaj al atakoj, ; Dum ĝua  
koncentriĝo almenaŭ cent  
stomakoj,

(×:; **Bruas danco en halo,  
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas  
ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Kaj akra saŭcodoro simile al  
incito ; Kreskigis la mezuron de  
sana apetito. ....

'3 Jam kuŝis sur la tablo, – pli  
ĝuste sur l' altaro – ; La ofertita  
besto, kaj estis ĝi omaro. ....

'4 Omaro netranĉita, en sia tuta  
formo ; Aspektis ŝafe milda kaj  
en profunda dormo; ....

'5 Videble pri marbordoj ĝi  
sonĝis sensuspekte, ; Sed saĝa  
festenano leviĝis kaj afekte ....

'6 Kun larva emocio li plendis  
al najbaro: ; "Ĝi ne efektiviĝos,  
la sonĝo de l' omaro\*!!" ....

'7 Kaj en regula takto dufoje  
cent makzeloj ; Movigis dum  
maĉado santiom da oreloj... ..

'8 Dank' al kaprica vino ruĝiĝis  
palaj vangoj ; Kaj babileme  
tiam sin movis ĉiuj langoj. ....

'9 Pri arto, pri scienco kaj nun  
pri politiko ; Sagace sin  
ekzercis diskuto kaj kritiko, ....

'10 Sed ŝvebis harmonio eĉ  
super tikla temo, ; Ĉar ĉiuj sin  
distingis per vera... teleremo\*!!

'11 Fervora komunisto predikis  
elokvente ; Pri nova ŝtatsistemo  
kaj montris argumente ....

'12 Disigajn diferencojn de  
diversrangaj klasoj... ; Dum  
fajro de l' diskuto li el najbaraj  
glasoj ....

'13 Trinketis senatente, – sed tiu  
ĉi detalo ; Klarigas l' originon  
de ĉiu... glasbatalo!\* ....



'14 Subite tra la pordo – (ĝi estis nefermita) ; Eniris grava viro kaj venis seninvita. ....

'15 Ni scias laŭ proverbo, ĉu ne, ke "la petito\*" ; Dummanĝe venas", tamen jen venis nepetito! .....

'16 Kaj tiu grava viro, suĉinte kokan oston, ; Pri sia personeco komencis longan toston. ....

'17 – La mutaj samtablanoj konjektis kun angoro: ; "Ho, Dio, kiom tostas\* ĉi tiu oratoro!?" – .....

'18 De Ventra\* Komitato leteron li laŭtleĝis, ; Laŭ ĝi oficiale lin mem oni delegis, .....

'19 Por ke oficiale ĉeestu li festenon ; Al ĉiuj alportante oficialan benon. ....

'20 Ĝistede li insistis per tiu ĉi formulo: ; "Resume do mi estas la Oficialulo!" .....

'21 En tiu ĉi momento veplenda ĝemospiro ; Haltigis la torenton de nia verva viro, .....

'22 Kaj baldaŭ multobliĝis la krioj kaj la ploroj, ; Kaj multaj festenanoj tordiĝis pro doloroj .....

'23 Frotante ŝvelan ventron, kaj tiel, per mimiko, ; La suferantoj plendis sendube pri koliko! .....

'24 Jam kelkaj naivuloj kun tima superstiĉo ; Akuzis l' oratoron pri tiu malfeliĉo, .....

'25 Sed iu, almontrante al jam malplena poto, ; Ekkriis: "Ne! – Ni estas viktimoj de... kompoto\*!!" .....

'26 Kaj nun sin manifestis fatalo senkompata, ; (Prefere mi silentus pri punkto delikata!) .....

'27 Sed malgraŭ diskretemo de ĉasta embaraso ; Aŭdiĝis bru' simila al eksplodanta gaso, .....

'28 Kaj sub venĝanta premo perfida de skrupulo ; Honteme ekruĝiĝis... la Oficialulo!... .....

'29 Saĝuloj tuj konkludis, facile, sen enketo: ; "La Oficiala... Gaseto\*!!" .....

## & Harald balado:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Sur bazo de artikolo de Jens Stengaard Larsen ([http://www.liberafolio.org/Membersjens\\_s\\_larsenkiu-efektive-estis-blinkenberg](http://www.liberafolio.org/Membersjens_s_larsenkiu-efektive-estis-blinkenberg)) verkis Martin Strid (2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de feroa Foka balado (Kópakvæðið). Klarigojn vidu post la strofoj.>

*(#Kópakvæðið: <:33> (SoSo SoFa MiRe SoSo; do dore dodo; TiLa LaLa LaLaLa TiLa; LaSo SoLa SoSo; (#Rekantaĵe: FaMi ReMi Fa So; dodo dore dodo; TiLa LaLaLa LaLa TiLa; La LaSo SoLa SoSo; FaMi ReMi Fa So o))x25 )+*

(&:

'1 En popola altlernejo ; Harald\* instruas, ; Junularan Federacion ; klere kontribuas. (×:; **Bonas jen por danci ; Nova estas dom', ; trajtoj estas el fer' faritaj, ; tegmento plumba krome. ; Bonas jen por danci.**)

'2 Diras Harald al Andreo\*: ; "Lingva profesor'! ; Pri vortaro mi havas ideon ; sed estas amator'." .....

'3 Harald estas pacifisto, ; senperforton kredas. ; En lernejoj por rezisto\* ; li prelege pledas. ....

'4 Registaro de la danoj ; postulas pli da justo. ; Kunlaboro kun germanoj ; kolapsas en aŭgusto\*. ....

'5 Ekas ĝenerala striko, ; tuta lando protestas. ; Okupantoj kun svastiko ; danojn ostaĝe arestas. ....

'6 Kaptas ili en Orhus-urbo\* ; dek unu korifeojn, ; inter ili Verdaburgan\* ; Haraldon kaj Andreon. ....

'7 Harald kaj eminentuloj ; estos mortviktimoj, ; sed nazioj miskalkulis: ; Ĉe Harald mankas timo. ....

'8 Harald en malliberej' ; anstataŭ nenifar' ; povas per libroj el la hejm' ; labori pri vortar'. ....

'9 Vidas Andreo ĵaluza ; kiel diletanto ; Harald sian tempon uzas ; por lingvo Esperanto\*. ....

'10 Liberigis Andreon ili ; en la deka tago. ; Dudek tagojn Harald trankvilis ; en sia verka ago. ....

- '11 "Harald, iru el karcero, ; vin armeo gracias!" ; "Sed restontojn ĉu danĝero ; ĉi tie ne minacas?" .....
- '12 "Se vi ne iros en liberon ; kiel ni vin petis, ; vin perforte el karcero ; devos ni forĵeti!" .....
- '13 Harald do reiris hejmen ; "Kara mia edzin', ; karaj filoj, mi envejne ; ĝojas vidi vin!" .....
- '14 Vintre telefonas Andre' ; "Ĉu vi radion aŭdis? ; Redaktisto nazia\* tre ; akre vin malaplaŭdis. ....
- '15 Inter partioj demokratiaj ; en via parolad'\* ; mankis tiu de nazioj ; diras la "kamarad" . ....
- '16 Dormu bone, mi esperas ; ke mi vin revidos, ; kaj atentu, nun danĝeras!" ; "Ĉu? Sed mi ne timidos." .....
- '17 Tuj de Harald la amikoj ; pro ĉi nova minac' ; estis tute en paniko ; kaj agis per sagac' . ....
- '18 Ili Haraldon igis fuĝi ; trans maron al Sveduj', ; poste lia domo ruĝis, ; pro eksplodo\* tuj. ....
- '19 Kun la familio "sub grundo"\* ; Harald konaton ; reenkontis trans la Sundo\* ; – profesoron Blatt\* . ....
- '20 "Blatt, saluton, kun Andreo ; antaŭ la milito ; pri faŝismo vi eseon ; verkis\*, ĉu, sen spito?" .....
- '21 Andreo pri la lingvo franca ; estas ege sperta. ; Li vortaron tre nuancan ; verkas majstre lerta. ....
- '22 Harald lasis ĉe li spuron ; pro sia metodo: ; Por Andreo la kulturo ; devas esti klopodo. ....
- '23 "Vidis mi viron sen hezito ; tajpi sian vortaron ; esperantan dum milito ; sen kulturaj baroj. ....
- '24 Sed ne povas tiom facila ; esti lingva voj' ; dum suferas mi humila ; laboris li kun ĝoj'." .....
- '25 Dek jarojn post la fuĝa dramo ; en Montevideo ; kontraŭ Esperanto malamon ; montris Andreo\* . ....)

**<& Klarigoj(\*) al Haraldala balado:**

'1 Harald Grønberg (1899-1984), danespo kaj instruisto.

'2 Andreas Blinkenberg (1893-1982), profesoro pri franca lingvo kaj romanistiko en universitato de Århus 1934-1963.

'3 Kontraŭ germanoj naziaj kiuj dum 1940-1945 Danujon okupis.

'4 En la jaro 1943.

'6 Dane Aarhus aŭ Århus ; "Grøn borg" signifas "verdano burgo".

'9 Harald kun sia edzino publikigis danan-esperantan vortaron en 1949.

'14 Helge Bangsted (1898-1974), ĵurnalisto, estro de la dana nazia partio 1942-1945.

'15 En urbo Skive.

'18 Nazioj eksplodigis ĝin.

'19 Sub grundo: kaŝiganta ; Sundo: la markolo inter Selando en Danujo kaj Skanujo en Svedujo ; Franz Blatt (1903-1979), profesoro pri klasika filologio ek de 1934, estis unu el la dek unu arestitaj ostaĝoj en Århus.

'20 En 1932 la universitata eldonejo de Århus eldonis libreton kun la titolo: "La faŝismo: tri prelegoj pri la nova Italio". Du el la prelegantoj estis Blinkenberg kaj Blatt.

'25 En Argentino en 1954 Unesko-konferenco akceptis rezolucion pri Esperanto malgraŭ malestima kontraŭparolo de Andreas Blinkenberg, tiama delegito de Danujo.>

## & Hermes kaj la lignohakisto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo tradukita de Leiva balado disduiginte la versojn.>

*(#: <:29> (mi mimi reedodo doLa; dore miimimi mi; mildo dore redo doLa; dore mimi mi; (#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a) )x13 )+*

(&:

'1 Faligis foje hakilon ; sian lignohakist' ; e2n la riveron, kaj post ; ĝi kun granda trist'

(×: **Paŝu firme sur plank'**, ; ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu dio, ; kie dancos ni sen mank'.)

'2 rigardis sur la bordo. ; Hermes dum preterir' ; e2kvidis lin, demandis: ; "Kial la suspir'?" .....

'3 Kaj, kun kompato scii;ĝinte pri l' afer', ; li2 orhakilon portis al ; li el la river': .....

'4 "Ĉu estas via?" "Ho, ne" — ; estis la respond'. ; A2rĝenthakilon nun li ; levis el sub ond': .....

'5 "Ĉu via?" "Ne." Li portis ; je la tria foj' ; la2 lian. Tiun nia ; homo kun ega ĝoj' .....

'6 rekonis, kaj la dion ; kore dankis li. ; Do2nacis Hermes tiam ; al li ĉiujn tri. ....

'7 Feliĉe la homo iris ; for, kaj ĉe l' renkont' ; a2l la kunuloj gaja ; estis lia rakont' .....

'8 pri l' incident' agrabla: ; La perdo de hakil' ; fa2riĝis por li granda ; gajno kaj util'. ....

'9 [Unu el] la kunuloj, avi;dega enviul', ; so2piris gajnon saman, ; tial sen skrupul' .....

'10 li iris al la rivero, ; en ĝin ĵetis mem ; ha2kilon sian kaj la;mentis inter ĝem'. ....

'11 Nu, ankaŭ lin ekvidis ; Hermes dum preterir', ; ka2j same lin demandis: ; "Kial la suspir'?" .....

'12 Kaj same, kiam li sci;iĝis pri l' afer', ; li2 orhakilon portis al ; li el la river'! .....

'13 "Ĉu via?" "Jes!" — avide ; kriis la homaĉ'. ; Malaperis dio, hakilo, ; restis la domaĝ'. .... )



## & Interkona balado:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, tiom da strofoj kiom da homoj en la ĉeno. Verkis Martin Strid (2016) kaj komponis sur bazo de dalekarla marŝmelodio. La strofoj estas nur ekzemploj – ĉiu dancanto elpensu kaj kantu mem sian propran unu strofon, ĉu maĵore ĉu minore. Klarigo (\*): '1 La kantinto premu la manon de sia dekstra – do malantaŭa – najbaro por signali ke tuj estos ties vico kanti sian strofon.>

*(#:<:37> ((#Maĵore: do doTi dore mifa; soso somi dodo domi; remi reTi SoTi remi; dodo doTi dore mifa;) ? (#Minore: La LaSi LaTi dore; mimi mido LaLa Lado; Tido TiSi MiSi Tido; LaLa LaSi LaTi dore;)*

*(#Rekantaĵe: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La a) )x5 )+*

(&:

'1 Estas mi sveda homo ; Martin estas mia nomo ; pri baladoj mi parolas ; kaj violonludi volas.

(×: **Dankon! Parolon donu ; dekstren\* en la ĉeno ; ke ni ankaŭ tiun konu ; ĝojaj en kompreno ; kaj aŭskultu ĉiun ĝis reveno.**)

'2 Estas mi joruba homo ; Ĉinua mia nomo ; politikon mi parolas ; trovi koramikinon volas. ....

'3 Jen mi portugala homo ; Maria Magdalena nomo ; pri aŭtoj mi parolas ; trinki teon ofte volas. ....

'4 Estas mi hinda homo ; Raĝiv estas mia nomo ; en teatro drame rolas ; kaj vegane manĝi volas. ....

'5 Estas mi japana homo ; Kuregaŭa mia nomo ; sociologion parolas ; lerni esperanton volas. ....

'6 Estas mi kabila homo ; Fatma estas mia nomo ; mi validajn varojn vendas ; kaj per poŝto ilin sendas. ....

'7 Estas mi hebrea homo ; Joŝi estas karesnomo ; komputilludojn mi parolas ; eviti militservon volas. ....

'8 Kurda mi estas homo ; Arda estas mia nomo ; pri ruinoj mi parolas ; kaj kuiri fiŝon volas. ....

'9 Estas mi usona homo ; Ĝenni estas mia nomo ; novan modon mi debatas ; kaj aĉeti robojn ŝatas. ....

'10 Estas mi brazila homo ; Ĵavi estas mia nomo ; spiritisme parolemas ; kaj pri reŭmatismo ĝemas. ....

'11 Estas mi amhara homo ; Hajle estas mia nomo ; pri progreso mi parolas ; pentri vian portreton volas. ....

'12 Mi estas pola homo ; Danka estas mia nomo ; amrilatojn mi komprenas ; dance cirklas mi kaj ĉenas. ....

'16 < *Jen via interkona strofo:* > ... ..

'13 Estas mi feroa homo ; Bjatni estas mia nomo ; brandon mi volonte suĉas ; kaj delfenojn foje buĉas. ....

'14 Jen mi germana homo ; Rudi estas mia nomo ; teron tage mi mezuras; poste en drinkejon kuras. ....)

'15 Estas mi gikuja homo ; Ĉege estas mia nomo ; esperanton mi parolas ; kaj feroe danci volas. ....

## & Iva balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1073 paŝoj dum 12 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2017).>

**(#: (LaLa dodo milfa mire; re doTi domi; soso soso faso laso; soso mire doTi; (#Rekantaĵe: Lado mifa mire redo doTi domi laso mimi LaTi dsodo mimi doLa TiSi La a) )x37 )+**

(&:

'1 Kantos mi bala2don de ; Ivo Lapenna ; trian gvidis lukton li por ; lingvo mondkomprena.

(×:; **En la lumon levis li Universalan Esperanto-Asocion kaj la lingvon de l' homar'.**)

'2 Ĉe Unuiĝintaj Nacioj ; estro mondestabla ; Sciu ke la vorto iva ; signifas igkapabla. ....

'3 Ĉe unua provo ankoraŭ ; nia majstro vivis ; sed pri bo[no de Blu]jido Bofronta ; tro li naivis. ....

'4 Prezentiĝus Esperanto ; en Parizo pompa ; sed fiaskis pro la vanto ; de idistoj trompaj. ....

'5 Post milito monda oni ; duafoje provis ; Ligo de Nacioj volis ; pacan moron trovi. ....

'6 Francoj diris ke ilian ; lingvon elitan ; devas uzi tuta mondo ; civilizita. ....

'7 Poste nazioj venis ; ankaŭ faŝistoj ; estis espoj sur iliaj ; malliberiglistoj. ....

'8 Hitler Esperanton fermis ; per perforto nuda ; nepre volis li ekstermi ; la lingvon de la judo. ....

'9 Espoj sovetuniaj devis ; por vivo batali ; en la laborkoncentrejoj ; de kamarado Stalin. ....

'10 Pri bezono komunika ; imperioj surdas. ; La movadon en Rusujo ; Stalino murdas. ....

'11 Post la dua mondmilito ; estis rekomenco ; Unuiĝintaj Nacioj havis ; bonan pacintencon. ....

'12 Ĉu kolonia devos esti ; ĝia laborlingvo ; kvankam povas ni atesti ; multe pli bonan atingon? ....

'13 Tian lingvon oni ĉagrenos ; pro temporabaj studoj. ; Por la homoj ne konvenos ; idiomaj trudoj. ....

'14 Lingvo nacia malfacilas ; pro esceptoj en vico. ; Por lernantoj ne utilas ; gramatika kaprico. ....

'15 Angla lingvo progreson drenos ; elparolon konfuzas. ; Pene oni per ĝi komprenos ; kiujn vortojn uzas. ....

'16 Inter la nacioj serĉas ; Ivo apogon, ; devas Esperanton defendi ; kontraŭ mensogoj. ....

'17 En Urugvajo Unesko ; Esperanton traktos ; ĉar ĉe membroj scioj kreskas ; pro Ivo pri la faktoj. ....

'18 Peticion subskribis naŭcent ; mil individuoj ; kaj organizoj aplaŭde ; kvincent kontribuoj ....



'19 Delegacio de Meksiko ; ĉe la konferenco ; donis por la lingvo indikon ; de bona intenco. ....

'20 De lingvistika fako ; oni konsilon petas, ; sed jen Blinkenberga atako ; kvazaŭ analfabetas. ....

'21 Lerte li la petskribon tondis ; per mensogoj tute ; kaj rajtis Ivo respondi ; nur triminute. ....

'22 Voĉdono unua estis ; nia malvenko ; sed malcede Ivo restis ; bola sur la benko ....

'23 "Ĉu ciferojn romiajn do ; por eĉ pli granda klaro? ; Mo co mo lo i kaj vo ; signifas nunan jaron. ....

'24 La programkomisiono rifuzis ; pro moko de la dano. ; Ĉu mi povas tion uzi ; ĉe montevideanoj? ....

'25 Blinkenberg nian lingvon komparis ; kun urugvaja menuo. ; Pri ties malestimo ; nun mi faros bruon!" ...

'26 Fine tial Unesko akceptis ; lian proponon ; kaj konsentis ĉiam respekti ; esperantorezonon. ....

'27 Dek du jarojn poste Ivo ; frontis pli grandan defion: ; Al Unuiĝintaj Nacioj ; faris ni peticion. ....

'28 Sepdek milionoj da homoj ; Esperanton apogis. ; Imperiaj idiomoj ; ne ilin allogis. ....

'29 Sed ankaŭ tiam gajnis ; koloniaj potencoj. ; Nova lingvo al ili ŝajnis ; mise konsekvenci. ....

'30 En universitato Kembriĝa ; du studantoj ronkis ; apud Johano Putoj prestiĝa ; estis Hamfri Tonkin. ....

'31 Ili regon anglan amis ; kaj fanfarone ; volis per ĝi vaste fami ; potenculojn kone. ....

'32 Dermod per satiro mokis: ; "Ivo diktatoras" ; kio Ivon tre provokis ; "Kiu vin sponsoras?"

'33 Puĉis ne la komunistoj ; en UKo Hamburga ; angloamerikaj statistoj ; lerte dramaturgas. ....

'34 Post la fia kalumnio ; estas mia sento: ; Al la monda asocio ; mankas jam la dentoj. ....

'35 Sed ne kredu vi ke estas ; konspiracio, ; se oni al vi ridetas, ; fidu al tio. ....

'36 Kaj naive kredu, kara, ; ke ĉiuj homoj bonas, ; kaj batalon cedu ĉar ; perfidon vi ne konas. ....

'37 Kaj la vivo estu glata ; kaj la tero plata ; kaj ne ronda ĉar la mondon ; vidas vi trompata. ....

)

## & *Holera kanto:*

< Rekante 24 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4876. Verkis Alf Prøysen. El norvega tradukis Kukoletto (1993 floRE). Klarigo (\*): '6 Nej = ne!, maljes ; doktoro = kuracisto.>

(#: (Mi /La LaTi do TiLa do3do dore mi i; la afa so fa mi i i; mifa so somi fa fare mimi mido La; fafa fa re fa ami mi La do; rere mi fami re dodo Ti La La a) ×6 )+

(&:

'1a Iam okazis en ĥolera land' (×:; **hu huhuhu hu** ;) entombigo de ŝajnmorta vir' ĉe vivrand' (×:; **Sude rula la, de rula la ; sude ri, sude ri, sude rula la.**)

'1b /Iam okazis en lando de ĥoler' (×:; **hu huhuhu hu** ;) entombigo de ŝajnmorta viro, ho mizer' (×:; **Sude rula la, de rula la ; sude ri, sude ri, sude rula la.**)

'2 Plej poste vidvin' iris en sekvantar' ..... rigardante la ĉerkon, kantante sen bar' .....

'3 Sed kiam ĝi venis al templa angul' ..... ek demetis kovrilon de l' ĉerk' ŝajnmortul' .....

'4 "Mi ankoraŭ ne mortis, jen viva figur' ..... senutile vi portis, returnu do nur." .....

'5 Sed paŝis vidvino al ĉerko en front': ..... "Nu, vi kiel kondutas, nin gardu de hont'." .....

'6 "Nej, dece kuŝiĝu en ĉerkon ĉi ..... la doktor'\* ja komprenas pli bone ol vi." .....

## & Karoto kaj rozo:

< Ripete 23 sed rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 186 paŝoj dum 3 minutoj.  
Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017).>

(#: <:31> (/LaLa dore; mimi mido; rere reTi; LaLa LaMi; LaLa dore; mimi mido; rere reTi; (#Rekantaĵe: La La; mimi miso mimi rere reTi LaLa Mi; mimi miso mimi redo rere reTi La a))x6 )+

(&:

'1 (': La karoto ; al la rozo ; diris kun la) ; seriozo: (: La karoto ; al la rozo ; diris kun la) (×:; **tiel. ; Tretu en la danco, ; drume draŝu paŝa spur'**. ; **Dume noktaj bestoj dormu en la nesto nur.**)


'2 Sole nur por ; sens-plezuro ; servas via ; sinekuro. ....

'3 Laŭ radiko ; nemanĝebla, ; laŭ florkrono ; nur celebra! ....

'4 Roz' respondis ; grandanime: ; Kia krimo ; nu, fin-fine? ....

'5 ĉiam servis ; por ornamo ; la simbolo ; de la amo. ....

'6 Jen, estiĝas ; pri mi kantoj! ; Min portadas ; geamantoj. ....



## & Kampulo kaj korniko:

< Maĵora rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 576 paŝoj dum 7 minutoj. Minora rekante ripete 11 sed rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. El sveda tradukis Kukoletto (1993 --oRE). Klarigoj (\*): '13,17 Als = tiel, ke ĝi poste estas.>

(#: ((#Maĵora: <2,5:4> Do MiSo Do MiSo Mi So do o;  
La Fa La do SoSo SoFa Mi i;So Fa FaLa Re ReFa Mi So  
Do o;Re Re Fa TI ReDo DoDo Do o; ) ? (#Minora:  
<1,4:> ;LaLaLa LaLaLa miimi mi; faaso faami reldore  
mii;mi doremi doremi reeTi doodo; TiiSo La Laami  
milredo TiiSo La a;))x18 )+

(&:

'1

(&Maĵora: Iris kampulo en pinarbar' (×:; **hejom fejom fale rale ra**  
;) li vidis kornikon kantantan klare (×:; **hejom fejom fale rale ra.**))  
?

(&Minora: Iris kampulo (': en pinarbar') (×:; **falu lej,**) (': en  
pi2narbar' ;) li vidis kornikon, ĝi kantis klare (×:; **Falu lej, fale lu2le  
lulan lej.**)



'2 Ektimis kampul' kaj  
rekuris al bien' ..... "Aj,  
panjo, min mordos korniko  
jen!" .....

'3 Ŝpinis l' ulino ĉe sia  
ŝpinrad' ..... "Ĉu homon  
atakus kornik' per mordad'?"  
.....

'4 Streĉis pafarkon kampul' per genu' ..... li pafis kornikon en alta  
situ' .....

'6 Venis mesaĝo de l' inspektist' ..... "Vi pafis kornikon el kia  
konsist'?" .....

- '7 "Kornik' en la dom' estas pro mia streb' ..... da kandel' dek du funtojn mi faris el seb' .....
- "8 El plumoj por ĉiu lito kusen' ..... eĉ por servistaro sufiĉis la ben' .....
- '9 Ventumilojn el flugilpluma afer' ..... kiujn\* uzos knabinoj dum bela veter' .....
- '10 El beko preĝejan turpinton por fest' ..... ni faris preĝejturan kokon el krest' .....
- '11 Knedujon ni faris el ĝia krani' ..... ne estis pli granda dum homhistori' .....
- '12 La kolo korniĝis por sona blov' ..... ĝi sonis pli forte ol grandulbov' .....
- '13 Ŝuparojn dek du el ĝia stomak' ..... restaĵon ni faris als\* granda sak' .....
- '14 Intestoj fariĝis dekducola ŝnur' ..... forkego por sterko el ĉiu krur' .....
- '15 La viando metiĝis en tinojn kun sal' ..... krom steko acida, por paĉjo regal' .....
- '16 Ni faris velŝipon el ĝia ripar' ..... plej grandan velintan sur nia mar' .....
- '17 Postaĵon mi faris als\* kudrista ring' ..... korniko por ni estis bona ating'." .....
- '18 Do kantu la kanton ajnulo laŭ plaĉ' ..... nenion forprenu pro l' impostaĉ' .....

## & Kampulo kaj edzino:

< Rekante 10 el 23 batoj por strofo, entute 184 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5218. El sveda tradukis Kukoleto (1993 FOrE).>

(#5218: <:23> (/Soododo dodo SoTi re; Ti re;re TiSo do mi i;mi fala faare doso mi; fala faarere doTi La; LaaLaLa fami re do o)×8 )+

(&:

'1 "/Staras soldat' sur nia kort'!  
(×:; **Aj, aj!**", ; **kampulo diris** ;)  
"Malfermu l' pordon, enlasu lin,  
; estas eble amik' de mi," (×:;  
**lia edzin' respondis.**)

'2 "Kie sidos la soldat'?" .....  
"Sur la seĝo ĉe la tablo, ;  
kartludos kaj adultafablos," .....

'3 "Kion manĝos la soldat'?" .....  
"Ovaĵon sur arĝenta plad', ; li  
staris en militparad'" .....

'4 "Kion manĝos dume mi?" .....  
"Acidbrasiko, putrangil' ; vin  
konvenas, avarfil'," .....

'5 "Kie kuŝos la soldat'?" .....  
"En nia lit', sur mia brak', ;  
fikante min ĝis varmatak'," .....

'6 "Kie kuŝos dume mi?" .....  
"Ĉe la porkoj en porkeĵ', ; ronku  
kaj piedbatu plej" .....

'7 "Sed porkpediko mordos  
min," ..... "Se mordas ĝi, vi  
kontraŭmordu, ; vigle batu ĝin  
ĝis mort'," .....

'8 "Satan', mi kredas, rajdas  
vin," ..... "Se rajdas li min, do  
loĝas li vin, ; ĉar tro malmulte  
vi fikas min," .....

## & Karinjeto:

< Ripete 16 el 32 batoj por strofo, entute 416 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4418. El sveda tradukis Kukoleto (-LORÉ).>

(#: ( (imi LaTi domi milre domi somi fare mi)× (imi somi fare mildo LaTi domi milreTildo La)× )×13 ah )+

(&:

'1 (Kaj Karinjeto se2rvis en  
re2ĝa kastel'.)× (Inter

servisti2noj ŝi brilis ki2e2l  
stel'.)×

'2 (Inter servisti2noj ŝi brilis kiel stel'.)× (Kaj juna reĝo Karinjeton alparolis tiele:)×

'3 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Ĉevalon grizan kaj orselon donos mi2 a21 vi.)×

'4 (Ĉevalo griza kaj orselo estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'5 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Plej ruĝan oran kronon mian donos mi2 a21 vi.)×

'6 (Plej ruĝa ora krono via estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'7 (Aŭskultu, Karinje2to, ĉu estos vi kun mi?)× (Duonan reĝan regnon mian donos mi2 a21 vi.)×

'8 (Duona reĝa regno via estus troa glor'.)× (Al via junreĝino donu, lasu mi2n kun honor'.)×

'9 (Aŭskultu, Karinje2to, se vi rifuzas min,)× (en najlan la bare2lon metigos mi2 ja2 vin.)×

'10 (Kaj se en najlan la barelon vi metigos min,)× (anĝeloj diaj vi2dos ke mi ne ku2lpa2s ĝin.)×

'11 (En najlan la barelon enmetis ili ŝin.)× (Kaj reĝaj fra2ŭle2toj ĉirkaŭen tu2rni2s ĝin.)×

'12 (Kolomboj blankaj ve2nis de la ĉielo du,)× (prenante Karinje2ton kaj tri fari2ĝi2s tuj.)×

'13 (Kaj korvoj nigraj ve2nis de la infero du,)× (prenante junan re2ĝon kaj tri fari2ĝi2s tuj.)× )



## & Korniko kaj ĉasisto:

< Ripete 12 sed rekante 7 el 19 batoj por strofo, entute 201 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #144. El sveda tradukis Kukoletto (1995, '1-6) kaj aldonis Martin Strid (2017, '2-4a,b). Klarigo (\*): '2 Tejn = tien.>

**(#: <2:19> <[Vo] = diro sen melodio> (/so mido miso solfa re; SooSoSo SoSo SooSoSo doorere mifa so o; so mido miso solfa re Voh h)×11 )+**

(&:

'1 /En arbo sidis ko2rnik- ; kule ri vimpam pamse ri pule ri vimpam pam ; En arbo sidis ko2rnik-et'.

'2 (: Ĉasisto brava ve2nis)

(×:; **kule ri vimpam pamse ri pule ri vimpam pam ;**)

(, : Ĉasisto brava ve2nis) tejn\*.

'2a Li vidis kornike2ton ..... en arb'.

'2b Li aŭdis kornike2ton ..... bleki.

'3 Li pafis kornike2ton ..... en arb'.

'3a Kaj falis kornike2to ... el arb'.

'3b Kaj falis kornike2to ... ĝis ter'.

'4 Li fritis kornike2ton ..... en gras'.

'4a Li manĝis kornike2ton ..... per fork'.

'5 Li manĝis kornike2ton ..... for.

'6 Kaj jen la kornike2ta ..... fin'. )

## & La glorkanto al UEA:

< Ripete 14 sed rekante 4 el 23 batoj por strofo, entute 368 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Jean Thierry (kabaredo La Tri Koboldoj, kun Raymond Schwarz, 1944-1956) laŭ melodio de franca kanto "Dans une tour de Londres", kiun primaktigis Martin Strid (2016).>

**(#: <:23> (/Mi LaTi doTi La MiMi Fi La Mi i; Mi LaTi doTi La Mi;mi mire dore mi i;do dore do Ti La a)×16 )+**

(&:



'1 /Mi konis delegiton **de UEA** ; Mi konis delegiton ; fervoran pli ol mi ; fervoran pli ol mi.

'2 (: Li portis la jarlibron) (×: **de UEA**) (: Li portis la jarlibron) (; en sia poŝ' kun si)×

'3 Okaze de kongreso ..... utilis ĝi al li .....

'4 Ĉar dum la festomanĝo ..... li manĝis pli ol tri .....

'5 Kaj kun la prezidanto ..... je sano trinkis li .....

'6 Nun sekvis la kunsido ..... de l' granda asoci' .....

'7 Konforme al statutoj ..... raportis ĉiu pri .....

'8 La multenombraj servoj ..... sur la teritori' .....

'9 Sed nian delegiton ..... ekkaptis emoci' .....

'10 Ĉar pri la utileco ..... Nenion sciis li .....



'11 Li diris: Karaj membroj ..... Mi venis tien ĉi .....

'12 En tiu ĉi momento ..... forkuri devis li .....

'13 Rezultis el agapoj ..... kolik' kaj kompani' .....

'14 O! ve! En la 'cesejo ..... ne estis flugfoli' .....

'15 Kaj tiam la jarlibro ..... utilis tre al li .....

'16 Ni kantu do la gloron ..... de l' granda asoci' .....

## **& La ĉevalo kaj la azeno:**

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

<p><b>(#: &lt;:29&gt; (La LaLa LaLa SoLa Ti La; So Ti La; La doLa SoSo SoSo Ti La; La Ti La; (#Rekantaĵe: do do TiLa So; TiLa La ; do do TiLa So; TiLa La a) )×6 )+</b></p>
-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

(&:

'1 Sen ŝarĝo la ĉeval' promenis ; fiere. ; Post ĝi azeno ŝarĝon trenis ; sufere, (×:; **Gaje paŝu nun ; en la ĉen ; ĝis leviĝos sun' ; en maten'.)**

'2 kaj ĝeme petis: Kamarado, ; min helpu! ; Ne lasu, ke min la penado ; elĉerpu! .....

'3 Vi la duonon portus lude, ; transprenu, ; ke mi, ŝarĝita tiel krude, ; ne svenu!" .....

'4 Sed ridis la ĉevalo, vanis ; la voko, ; orgojle dancis ĝi, rikanis ; kun moko, .....

'5 ĝis la azen' la penon jam ne ; elportis, ; ekstumblis, falis, blekis: "Damne!" ; kaj mortis. ....

'6 Nun devis porti tiu orgojla ; la plenon ; de la azena ŝarĝo — kaj la ; azenon. .... )

## & La oreloj de la leporo:

< Rekante 15 el 29 battoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#: <:29> (La dolre mi mi mire fare mi do; do reldo dodo doLa dodo doTi; (#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a) )×10 )+

(&:

'1 La le2onon vundis besto korna. ; Li o2rdonis en kolero morna:

(×:; Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.)

'2 "Ĉiu best' havanta korn-armilon ; iru el la regno en ekzilon!" .....

'3 Do elmigris cervo, kapreolo, ; kapro, ŝafo, ĉamo, kaj, ĉe kolo .....

'4 la orelojn longajn kuŝiginte, ; por ke tiuj ne elstaru pinte, .....

'5 (iris en ekzilon — la leporo. ;)× .....


'6 La sciuro miris: "He, baptano! ; Kien do vi iras?" "Al lontano."  
.....

'7 "Kial?" "Pro la kornoj."  
"Ho, ĉieloj! ; Tiuj longaj estas ja oreloj!" .....

'8 La leporo diris: "Ĉu por tio ; povas esti ia garantio, .....

'9 ke ne nomos iu el kaprico, ; favorĉaso, strebo aŭ malico  
.....

'10 la orelon longan longa korno? ; Tie ĉi evitus min la dormo." .....



## & La simio kaj la delfeno:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo) baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#: <:31> (mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi  
mimi mido re fa; (#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi  
re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi  
re do) )x12 )+

(&:

'1 Simio2n havis homo foje, ; tre ofte kun ĝi ludis ĝoje,

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun trankvile** ; **Ĉiuj ni trankvilas** ; **Jen en amika ĉen'** ; **Dancu nun trankvile.**)

'2 ĝin por amuzo kaj plezuro ; kunportis eĉ dum marveturo. ....

'3 Sed jen, tempesto eksovaĝis. ; La ŝipo dronis. Homoj naĝis. ....

'4 Dum la simio pene provis ; elnaĝi, ĝin delfeno trovis, ....

'5 kaj, ĉar ĝi homo ĝin rigardis, ; bonvole ĝian vivon gardis, ....

'6 surdorsen prenis ĝin por porto ; al seka kaj sekura bordo. ....

'7 Nu, kiam ili al haveno ; Pireo (rodo de Atheno) ....

'8 alvenis, la delfen' scivolis: ; "Ĉu Athenano?" "Jes!" — parolis ....

'9 tre fanfarone la simio, — ; "eĉ el plej nobla familio!" ....

'10 "Do, vi Pireon konas bone?" ; "Pireon? Certe, kiel do ne? ....

'11 Li estas ja al mi tre kara ; amiko, plej familiara!" ....

'12 Ko[lere] [pro l' men]sogo, la delfeno ; droni[gis la a]mikon de haveno. .... )



## & Lidja balado:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid.>

(#: <:31> ((MiLa dodo LaLa SoTi; rere rere mido;  
(#Rekantaĵe: LaLa LaLa LaSo Mi;) )×2 (#Rekantaĵe:  
TiSi TiTi rere mifa mi doLa MiSo La a))×10 )+

(&:

'1 Pri heroa brava homo ; temas mia kanto. (×:; **Fajro flamas en la forn'** ; ) Lidja Zamenhofa nomo ; gloras esperanton. (×:; **Preme pikas drata dorn'** . ; **Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.**)

'2 Naskis ŝin patrino Klara ; jen judino geta ..... kies edzo lingvon fara ; estis tute preta. ....

'3 Ŝia patro pacon amis ; kaj li lingvon kreis. .... Sed militoj poste flamis ; fine ŝi pereis. ....

'4 Por ŝi juna estis ĉio ; esperanto-ligo. .... La bahaa religio ; volas unuigon. ....

'5 Ŝi ĉe patra sia ĉerko ; pensojn piajn plukis. .... De Baha'-Ul-Lah' la verkojn ; bele ŝi tradukis. ....

'6 Ŝi laboris por la paco ; malgraŭ la defioj ..... En Eŭropo la minaco ; kreskis de nazioj .....

'7 En Usono ŝi instruis ; lingvon kaj la kredon. .... Militemo monda bruis ; ĉase sian predon. ....

'8 El Usono iri devis, ; hejmen ŝi revenis. .... En Eŭropo paco krevis, ; Hitler landojn prenis. ....

'9 Malfacile tradukebla ; verko Iridiono ..... brulis for kun hejmaj mebloj ; pro naziordono. ....

'10 Ŝi pereis en Treblinka, ; murdis la faŝistoj. .... Igas penso jen konvinka ; min esperantisto. .... )



## & Majkanto la malnova:

< Rekante 10 el 19 batoj por strofo, entute 437 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #2263. El sveda tradukis Kukoletto (1993) tradician parton. Aldonis (2015) movadan parton Martin Strid..>

(#: <1,1:19> (a;Mi LaSi LaTi doTi La; Si TiSi Mi Fi;Si TiLa LaSo MiiMiRe Do; ReRe MiMi SiLa Tido Ti La )x23 )+

(&:

### '&Tradicia:

'1 Vesperon bonan en bien'! (×:; **Majo bonvenas!** ;) Pardonu se ni vekas vin ; (×:; **Ĝoju ni pri dolĉa la somero.**)

'2 Nun venas ni al via bien' .....  
do ĉu ni rajtas kanti jen? .....

'3 Ni portas Majon en vilaĝ' .....  
kaj laŭdas ĝin per kantoomaĝ'  
.....

'4 Ĉar estas for la vintra mond'  
..... Nun verdas herboj kaj  
arbrond' .....

'5 La dolĉa alaŭdeta ton' .....  
leviĝas kun Majkanta son' .....

'6 Bonvena estu Majmonat' .....  
somero ĉi al Dia ŝat' .....

'7 Nin donu jaron da prosper'  
..... kaj gardu pri bieno kaj ter'  
.....

'8 Sur stangoj pendu fortlupol'  
..... Maldolĉabsinton semu en  
val' .....

'9 Butero, lakto kaj fromaĝ' .....  
kaj fagopiro por gria kaĉ' .....

'10 Abela don' da vaks', miel'  
..... por sano, manĝo, lum' kaj  
bier' .....

'11 Kokino metu sur la plad' .....  
por krespoj kaj por ovomangaj'  
.....

'12 Folias ni tegmenton ĉi .....  
Morgaŭan tagon vidos vi .....

'13 Bonnokton, dankon kaj al  
pac' ..... ĉar iom bonis la donac'  
.....

'14 Kaj kuŝu, kuŝu, pigra bov'\* ,  
..... ĝis puloj, pedikoj vin trenos  
al mov' .....

### '&Movada:

'15 Kongresos ni en la somer'  
..... en monda lingvo de la  
esper' .....

'16 Ni donos kursojn kun bona  
etos' ..... jen estas nia sulka fos'  
.....

'17 Babilos ni en gaja band' .....  
kun homoj el alia land' .....

'18 Per poezi' kaj literatur' ..... la  
lingvo vivas kaj per humur' .....

'19 Per gajaj kantoj kaj muzik'  
..... la lingvon uzos ni en  
praktik' .....

'20 Kaj paŝos ni en ĉena danc'  
..... kun rusoj, ĉino, polo kaj  
franc' .....

'21 Kaj paŝos ni en danca ĉen'  
..... kun anglo, persoj kaj sloven'  
.....

'22 Ĉendancos ĝue, man' en  
man' ..... kun brazilano kaj  
german' .....

'23 Ĉendancos ni en gaja ar' .....  
kun hindoj, japanoj kaj hungar'  
.....)

## & Marista lulkanto:

< Ripete 40 sed rekante 16 el 65 batoj por strofo, entute 325 paŝoj dum 4 minutoj.  
Norda Kantaro #5605. Malnova lulkanto kiun iomete poluris kaj popularigis Evert  
Taube. El sveda tradukis Magda Carlsson (1954).>

(#: *(La mi mi remi falmi redo Ti i;do rere rere re  
mire do o Ti '1 ih;)* × *(i;Ti dodo doLa Ti i;Ti dodo  
doLa Ti i;re re mifa mi redo Ti i La) × a h) × 6 ) +*

(&:

'1 ((×: **Lul - lal - lul'**, la  
**kaldro2no sur brul'** ;) alvenas  
tri migrantoj survoje ;) × (unua,  
ve, lamul' ; la dua, ho, blindul' ;  
la tria ne povas paroli. ;) ×

'2 ( ..... ĉiele migradas tri steloj  
;) × (unu blankas jen ; la dua  
ruĝas jes ; la tria estas luno, la  
flava. ;) ×

'3 ( ..... blovadas tri ventoj  
surmare ;) × (sur Granda Ocean'

; sur eta Skagerak' ; kaj longe  
for en golfo Botnia. ;) ×

'4 ( ..... veladas tri ŝipoj suronde  
;) × (unua estas bark' ; la dua  
estas brig' ; la tria havas velojn  
ĉifonajn. ;) ×

'5 ( ..... ŝipkest' havas tri  
figuretojn ;) × (unua estas kred' ;  
la dua la esper' ; la tria estas  
amo, la tre ruĝa. ;) × )

## & Major' Brak':

< Ripete 48 sed rekante 8 el 64 batoj por strofo, entute 512 paŝoj dum 6 minutoj. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

(#: <:4> (DoRe Mi Mi MilRe MiFa So o Mi;  
(#Rekantaĵe: FaMi Re Re Re DoRe Mi ilDo Do;) DoRe  
Mi Mi MilRe MiFa So ldo So; Fa Mi Mi Re Re Do o o;  
DolMi So So La La So o o; DolMi So do Fa Fa Mi i  
lRe; DoRe Mi Mi MilRe MiFa So ldo So o; Fa Mi Mi Re  
Re Do o o )x8 )+

(&:

'1 (': Major' Brak' mili2ton  
ironis,) (x:; **Mili tamtam tam,  
militi2stoj** ;) (:; Major' Brak'  
mili2ton iro2ntis, ;) (': vojaĝis  
de l' edzin'.) (:; Vo2jaĝis de l'  
edzin', ; vo2jaĝis de l' edzi2n',  
Major' Brak' mili2ton iro2ntis,  
vojaĝis de l' edzin'.)

'2 "Mi venos re ĝis pasko, .....  
aŭ certe somermez'." .....

'3 Kiam pasko preterpasis .....  
major' Brak' ne venis re. ....

'4 La edzin' eliris rigardi, ..... ŝi  
staris sur alta mont'. ....

'5 Jen fraŭlon veni ŝi vidas .....  
vestitan en funebr'. ....

'6 "Forprenu oran skarlaton, .....  
major' Brak' mortis en milit'."  
.....

'7 Major' Brak-on portis al la  
tombo ..... altrangaj viroj kvar.  
.....

'8 Unu portis la blazonon, ; **Mili  
tamtam tam, militistoj** ; **La  
dua portis la glaveton** ; kaj  
portis du lin mem. ; Kaj portis  
du lin mem, ; kaj portis du lin  
mem. ; Unu portis la blazonon ;  
kaj portis du lin mem.)



## & Maristo kaj junulino:

< Ripete 10 sed rekante 6 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4442. El sveda tradukis Kukoleto (1993 FLOrE).>

**#: (a;La miimimi fafa mi La3Ti dodo TiidolTi Lami mi i;La mimi siti lalsi mifi so3la sofi mi i;La mimi mamifiso mimi La;Ti do3re doTi La)×7 )+**

(&:

'1 Amuzas maristo juna sur  
verda kampo<sup>2</sup> sin, ja ja ;  
Renkontas junuli<sup>2</sup>non, ho bela  
junulin' ; kantadu trala lala lala  
lej ; ho bela junulin'.

'2 Ĉu volas vi esti mia sur la  
kampa verd, **ja ja** ; Ni plukos  
rozfoliojn (': por lito en la herb')  
(×:; **kantadu trala lala lala lej**  
;) (: por lito en la herb'.)

'3 Kaj baldaŭ estis lito, kaj  
rozoj tie por ĝu', ja ja. Do kuŝis  
ili kune, geedziĝontaj du .....

'4 Matene ilin vekis dolĉa venta  
blov', ja ja. Sed estis for la rozoj  
de l' junulina brov' .....

'5 Kompatu min gracia Dio,  
perdiĝis mia virgec', ja ja. Sed  
iros for malĝojo se vi estos mia  
edz' ;

'6 Ne povas mi nek volas esti  
edzo al vi, ja ja ; ĉar ŝipo mia  
pretas jam veli for de ĉi .....

'7 Malankras ek la ŝipo, sur  
ondoĵ velas for, ja ja. Sur bordo  
staras junulin', malĝoja ŝia kor'  
.....)

## & Murdist-Andrev:

< Ripete 14 sed rekante 4 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5573. El sveda tradukis Martin Strid.>

(#5573: <:29> (;/dore mimi mido re reTi do o; mifa soso soso la sofa so o; mifa soso soso ta; laso mido doLa do; dore mimi mido re reTi do o;)x7 )+

(&:

'1 (': /Murdist-Andrev estas mi,) (: estas mi ; Murdist-Andrev estas mi, estas mi, Murdist-Andrev estas mi, ; ) senkapiĝos tagon ĉi, ; laŭ la sveda leĝo, fi, (×: **je Satan'**.)

'2 Mi ja murdis virojn kvar, ..... jam ĉielen iris ĉar ; tuj revidos min la ar', .....

'3 Isto en la ruĝa led', ..... igos min al morto-ced', ; ĉar jen lia vivrimed', .....



'4 Pastro staras en deĵor', ..... logas per anĝela ĥor', ; sed ĝi restas sen valor', .....

'5 Ankaŭ venis jen Katrin', ..... estis mia karulin', ; blasfemantan aŭdu ŝin', .....

'6 Vi atendas al mortkri', ..... la kadavro belos ĉi, ĉion scenos mi por vi .....

'7 Sange haka ekzekut', ..... mia estos tuj tribut', ; kaj mi mortos kiel brut', .....

## & Oh, rajdis, rajdis:

< Ripete 32 el 48 batoj por strofo, entute 336 paŝoj dum 4 minutoj. Popolkanto. El litova tradukis Vytautas Šilas (1986?).>

(#: <:4> (/La LaTi do Ti /La Mi La a; /mi mifa mi re /do re mi i (; /mimi mifa mi re /mire doTi La Mi /LaLa Lado mi re /do Ti La a)×2 )×7 )+

(&:

'1 /Oh, rajdis, rajdis /longe mi. ;  
' /Oh, rajdis, rajdis /longe mi. ;  
' /Al bien' veninte, /al bien'  
veninte, /al bien' veninte /haltis  
mi. ; /Al bien' veninte, /al bien'  
veninte, /al bien' veninte /haltis  
mi.

'2 (Ligis mi ĉevalon al baril'  
;)×2 ((Ĉe verdanta ruta)×3  
ĝardenet'. ;)×2

'3 Skuis sian kapon la ĉeval' .....  
Ve, kaj aĉe tretis ..... verdajn  
rutojn ĝi. ....

'4 Ploras elirinta knabinet' .....  
Pro la verdaj rutoj ..... kiujn  
tretis ĝi. ....

'5 Ĉit! Ne ploru triste, knabinet'  
..... Ĉevaleton mian ..... donos  
mi al vi. ....

'6 Ne bezonas la ĉevalon mi .....  
Tute ne bezonas ..... la ĉevalon  
mi. ....

'7 Ĉit! Knabin', ne ploru pro  
ĉagren' ..... Mi al vi donacos .....  
ringon el la or'.

## & Petro sinjor' kaj Elinborg':

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1624 paŝoj dum 17 minutoj. Norda Kantaro #4444. Notis Schrøter. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Double tradukiĝis strofoj '3, '26, '34 kaj '36. Klarigo (\*): '21 Juta kavalirparolo: ĝentilula dialekto de Jutlando.>

(#: <1,6:29> (LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo; doTi doTi LaSo  
(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a) )×56 )+

(&:

'1 Petro sinjor' kaj Elinborg' ; estis infanoj junaj, ; sian amon metis kunen, ; multajn sorto punas.

(×: Nun emas mi e2n danco jam iri ; dum rozoj, lilioj kreskadas tre.)

'2 Petro sinjor' kaj Elinborg' ; estis infanoj riĉaj, ; sian amon metis kunen, ; multajn sorto sufiĉas. ....



'3a Metis li manojn sur ŝian kolon, ; al ŝi milde parolas: ;  
"Kiom longe vi, Elinborg', ; fianĉino, atendi min volas?"

.....

'3b Metis li manojn sur ŝian kolon, ; kise ŝin karesas: ; "Kiom longe vi, Elinborg', ; fianĉino, atendi promesas?" .....

'4 "Sep vintrojn atendos mi ; sen konsento fratula, ; ne edzigos vivan viron ; dum en mi vivo brulas. ....

'5 Sep vintrojn atendos mi ; kontraŭ fratula ŝato, ; ne edzigos vivan viron ; eĉ se min reĝo svatos." .....

'6 Petro sinjoro paŝas ; en la ŝipan sinon: ; "Mi malpermesas al ĉiu viro ; mian fianĉinon!" .....

'7 Petro sinjoro paŝas ; ĉe la ŝipa bivako: ; "Mi malpermesas al ĉiu viro ; dormi sur ŝia brako!" .....

'8 Sep vintroj forpasis jam, ; Elin eksopiras, ; ŝultras sur sin bluan mantelon, ; al fenestro iras. ....

'9 Elin' ĉe fenestro staras, ; elrigardas vaston, ; bela estis la ŝipo, ; sur maro ŝi vidas maston. ....

'10 "Bone konas mi la velojn, ; bone mi konas buspritojn, ; bone konas mi la ŝipon, ; por Petro sinjoro glitas." .....

'11 Elin iras al bordo malsupren, ; for tabulojn malŝlosis, ; bela estis la ŝipo ; kiu ĉe kajo flosis. ....

'12 "Aŭdu vi, riĉaj komercistoj, ; kion vi havas por vendi?" ; "Ni havas robojn kaj ruĝan skarlaton, ; plej bonajn vi povas mendi." .....

- '13 "Ne pri roboj mi zorgas, ; nek pri ruĝa skarlato, ; mi malĝojas ĝismorten, ; estas fremduje frato" .....
- '14 "Li ne estas via frato, ; ĉar vi estas paro. ; Li en Danujo loĝas ; regas burgon ĉe maro. ....
- '15 Li en Danujo loĝas, ; je nom' riĉa Petro sinjoro, ; li fianĉas al dana virino, ; ne kiel vi ŝi floras." .....
- '16 Elin iras de bordo supren, ; volvas sin en felo, ; iras ŝi en altan halon, ; sian fraton Ejrikon celas. ....
- '17 "Bone vi sidas, Ejrik, frato, ; jen min aŭskultu, kara: ; Ĉu vi estos mia stiristo ; trans la salan maron?" .....
- '18 "Vi eksidu ĉe mia tablo, ; kun mi hodiaŭ drinku! ; Fraŭlina moro ne estas veli ; sur maro, laŭ mia konvinko." .....
- '19 Elin sin turnas de halo eksteren, ; pleje ŝi koleris: ; "Dio ne lasu min vivi tagon ; pli al vi petojn oferi." .....
- '20 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; kunen sidigas en rondo, ; ŝi elprenas tondilon arĝentan ; hararojn ĉirkaŭtondos. ....
- '21 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; hararojn tondas ĉe koloj ; poste instruas al ili ĉiuj ; jutan kavalirparolon\*. ....
- '22 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; faras kavalirajn vestojn, ; iras ili malsupren al bordo ; kie ŝi jam estis. ....
- '23 Ejrik al la bordo malsupren ; saman tagon iris: ; "Volas mi trans sala maro ; vian ŝipon stiri." .....
- '24 "Ne malpli mi vetas ol ; mian arĝentoringon: ; ke neniu vira homo ; ŝipan internon atingos! .....
- '25 Ne malpli mi vetas ol ; arĝentan krucon mian: ; ke neniu vira homo ; venos sur ŝipon nian! .....
- '26a Ne malpli mi vetas ol ; mian arĝentoŝnuron: ; ke neniu vira homo ; ŝipan tabulon suros! .....
- '26b Ne malpli mi vetas ol ; mian arĝentoĉenon: ; ke neniu vira homo ; sur la ŝipon venos!" .....
- '27 Tamen estis Elinborg', ; brave brilas trema ; kaj ĉe rudro stari iras ; kaj servistinoj ekremas. ....

- '28 Sur malhelan maron elremis ; dum monatoj du, ; neniun veteron havis ili ; por vidi teron de pruo. ....
- '29 Sur malhelan maron drivis ; en monato tria, ; neniun veteron havis ili ; por vidi teron ian. ....
- '30 Neniun veteron havis ili ; por vidi teron de pruo, ; antaŭ alta grundagreso ; falis la ondoj bluaj. ....
- '31 Diris mastrino Elinborg' ; per la vorto unua: ; "Ni prefere promesu almozon ; por vidi teron de pruo!" ....
- '32 Kelkaj promesis unun, ; kelkaj promesis duujn, ; tiam levis nebulo sin, ; ili vidis teron de pruo. ....
- '33 Ĉiuj promesis unun kaj duujn, ; Elin triujn promesis ; tiam sin levis la nebulo, ; kaj teron okuloj karesis. ....
- '34a Frue estis en mateno, ; ruĝas monton suno, ; tiam levis nebulo sin, ; ĉe Petrosinjora laguno. ....
- '34b Frue estis en mateno, ; suno ruĝas valon, ; tiam levis nebulo sin, ; ĉe Petrosinjora halo. ....
- '35 Paskosemajnan la vendredon ; ili sur maron ekvagis, ; kaj ne venis al tero antaŭ ; sankta Martena tago. ....
- '36a Ĵetas ili sian ankron ; sur blankan sablan fundon, ; paŝas unue Elinborg', ; metas piedon sur grundon. ....
- '36b Ĵetas ili sian ankron ; sur blankan sablobedon, ; paŝas unue Elinborg', ; sur teron metas piedon. ....
- '37 Meze en ĝardeno ŝi ; surŝultrigas felon, ; veste preta tiel iras, ; altan halon celas. ....
- '38 "Sana vi sidas, Petro sinjor', ; ĉe larĝa tablo! ; Ĉu ĝentilaj fraŭloj tiel ; vorton teni kapablas? ....
- '39 "Bone vi sidas, Petro sinjor' ; kaj mastrino dana! ; Ĉu ĝentilaj fraŭloj tiel ; tenas promeson manan? ....
- '40 Petro sinjoro de tablo turniĝas, ; arĝentan poton tenas: ; "Dio du okulojn benu, ; pri vi memoro plenas! ....
- '41 Aŭdu, mastrino Inĝibjorg', ; al mi ne koleru, ; dum mi sekvos nevon mian ; en tritaga konkero. ....

- '42 Dum mi sekvos nevon mian ; en tritaga konkero, ; se mi ne venos ĝis la kvara, ; ne min atendu espere!" .....
- '43 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; larmo vange venas: ; "Li ne estas via nevo, ; tute mi komprenas." .....
- '44 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; larmo vange reflektas: ; "Li ne estas via nevo, ; klare mi (tion spektas) ? (konjektas)." .....
- '45 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; per tria vorto finas: ; "Vire estas ŝi vestita, ; havas hararon virinan." .....
- '46 Sekvis ili al bordo sin, ; ĉiuj en kompanio, ; Petro sinjor' kaj Elinborg' ; kaj Inĝibjorg' la tria. ....
- '47 Inĝibjorg' staras sur blanka sablo, ; ŝi multege ploras, ; Elin staras en la pruo, ; ne aŭdas ke ŝin doloras. ....
- '48 "Vivu nun bone, Inĝibjorg' ; dana vi virin'! ; Mi ricevis fianĉon mian, ; dum tempo vi pruntis lin! .....
- '49 "Vivu nun bone, Inĝibjorg' ; ĉe rivero bunte! ; Mi ricevis fianĉon mian, ; longe mi donis prunte!" .....
- '50 Ploranta sin turnis al sia burg' ; mastrino Inĝibjorg', ; ĝoja velas Petro sinjor' ; hejmen kun Elinborg'. .....
- '51 Nupto ilia drinkata estis, ; viglis vivdestino, ; iris ambaŭ en saman liton, ; Petro sinjor' kaj edzino. ....
- '52 Ĉu orienten, ĉu okcidenten, ; ĉu mondoĉinon ekstreman ; - oni venos en saman liton ; se Dio kunigemas. .... )



## & Prefere silenti ol fie paroli:

< Rekante 27 el 41 batoj por strofo, entute 820 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4472. El sveda tradukis Kukoleto (loE). Unu rimon modifis Martin Strid ('15,'16, 2017). Klarigoj (\*): '1 La vortoj ne portas signifon. '11 Aĝi kiel la diablo: Esti tre maljunega. '12 Lagon de barita rivereto havas perakvoforta muelilo. '14 Laŭ malnova superstiĉo, sorĉistinoj ne sinkas en akvo.>

(#: <1,8:> (So do dodo mi miSo do do mi i; do o mi i do La So o;So do domi so soso fami fare mi i;do La Lado So o;do La Lado So o;So do do remi fare do Ti do o) x20 )+

(&:

'1 Sin interkonsilis friponoj du

(x:; skru ru rum pum pej ;)

la muelistfilinon atingu ili, ĉu

(x:; Ĉar treton en tru' ; jen puŝas la sku' ; ĉar treto kuŝas en la trota rej.)\*

'2 Ili metis do  
unun en sak'  
..... ĝin portis l'  
alia al muelista  
lag' .....

'3 – Ho, kara  
muelisto, mi  
petas en kriz'  
..... muelu ĉi  
grenon sed sen  
kotiz' .....



'4 – Jes, portu la sakon al mia dom' ..... ja nek estas rato, nek muso  
laŭ la kon' .....

'5 Do venis fripono al muelistoj' ..... pri tiu ruzaĵo malsciis ili plej  
.....

'6 Kaj kiam noktiĝis, nigriĝis la vak' ..... komencis kaj ruli kaj rampi  
tiu sak' .....



- '7 – Ho, kara patro, estu lum' ..... mi kredas, en la domo ŝtelistoj estas nun .....
- '8 Kaŝiris fripono sur piedpint' ..... al lito kie kuŝis la muelistfilin' .....
- '9 – Ne, kara panjo, lumon for ..... nur ludis la kato kun musa plor' .....
- '10 Respondis praanjo kuŝanta sur forn' ..... – Jes, kato en botoj, ne mankas la spron' .....
- '11 Ridetis praanjo, sendenta afabl' ..... ĉar same ŝi aĝis kiel la diabl'\* .....
- '12 – Silentu, praanjo, vin venos hont' ..... en lagon\* de patro vi morgaŭ plaŭdont' .....
- '13 Kaj kiam tagiĝis, kaj lumon al tag' ..... ŝin ĵetis ili maldelikate en la lag' .....
- '14 Kaj flosis\* praanjo en akva lok' ..... ŝia ulo ululis irante sur la rok' .....
- '15 – Ho, ulo, vi havas ja denton en tord' ..... min kaptu je haroj kaj tiru al la bord' .....
- '16 Kaj la ulo per sia dento en tord'..... kaptis praanjon kaj tiris al la bord'.
- '17 Sed la muelisto per longa lanc' ..... forpuŝis praanjon al bona pli distanc' .....
- '18 Do nodis praanjo spiralon el dors' ..... kun plaŭdo ŝi tujis al fundo sen rimors' .....
- '19 Finiĝu tiel ĉiu praanjo de klaĉ' ..... kiu silenti ne povas per peka buŝaĉ' .....
- '20 Sed pasas la tempo kaj je naŭmonata fin' ..... jen du bebuĉojn lulis la muelistfilin' .....

## & Pri nia kor'....:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 114 paŝoj dum 2 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) baladigis Martin Strid (2015) komponub nova melodio kaj verkub nova rekantaĵo.>

*(#: <:19> (o;do miimimi remi dodo o;mi soso fa;mi miimimi remi soso o; (#Rekantaĵe: soososo fafa mi;mi remi dodo; miimimi rere do))x6 )+*

(&: '1 Ni estu fieraj, fratoj ; pri **nia kor'**, ; pri ĝiaj doloraj batoj! (×: **Tenu la ĉenon jen ; Ĝi estu forta ; Tenu la ĉenon jen.**)

'2 Ĉar estas la bat' dolora ; en nia kor' ; pro tuta la mond' senkora.

.....

'3 Nin mok' kaj malam' rigardas; sed nia kor' ; nur amon rebrilas, ardas. ....

'4 En vintro de l' tempo nuna ; jen nia kor'! ; Ĝi estas la brilo suna.

.....

'5 Frostiĝas nun sent' kaj larmo... ; Sun': nia kor' ; vanluktas kun la malvarmo. ....

'6 Sed venos, ho venos tempo ; por nia kor'! ; Ni fidu je la printempo! ..... )

## & Sven en Rozĝarden':

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 276 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4478. El sveda tradukis Kukoleto (1993 FLOE).>

*(#: <1,7:23> (LaaSiSi LaLa mi mi; remi redo Ti i; TiTi reerere Ti do; LaLa doLa Si h;Si La LaLa milre doTi La La ah)x12 )+*

(&:

'1 Kie vi longe estis (×:; **Sven en Rozĝarden'?** ;) Estis mi en la stalo (×:; **kara nia panj'** ; **Atendu min ĉiam neniam.**)

'2 Kion vi faris en stalo ..... La ĉevalojn mi akvis .....

'3 Kial ĉemizo sangas ..... Min hufbatis blanka ĉeval' .....

- '4 Kial la glavo sangas ..... Fraton mi mortbatis .....
- '5 Kien vi povas iri ..... Mi de l' lando fuĝos .....
- '6 Kion l' edzino faru ..... Ŝpinu ŝi por pano .....
- '7 Kion viaj infanoj faru ..... Ili petu ĉe ĉies pord' .....
- '8 Kiam vi revenos ..... Kiam cigno nigros .....
- '9 Kiam nigros cigno ..... Kiam korvo blankos .....
- '10 Kiam blankos korvo ..... Kiam plumo sinkos .....
- '11 Kiam sinkos plumo ..... Kiam ŝtono flosos .....
- '12 Kiam flosos ŝtono ..... Flosos ĝi neniam .....

## & Testamento de l' etulino:

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #5543. El sveda tradukis Kukoleto (1993 FIORE).>

*(#: <:23> (aLa LaaaLa LaaLaLa Lalmi mi; reedoTi LaSi Mi i;mi miimimi fimi reldi La; do reldoTiSi La a; La Mi do Ti SiiLaTi La ah)×5 )+*

(&:

'1 Vi kion tie rice2vis ; mia pruntit-filin'? ; Ŝi faris angilon pi2pran ; duo2na patrin' ; Aj, aj, tre doloras al mi.

'2 Al frato kion vi donos (×:; **mia pruntit-filin'?** ;) Ambaŭ miajn kestojn (×:; **duona patrin' ; Aj, aj, tre doloras al mi.**)

'3 Al franjo kion vi donos ..... Ĉiujn miajn vestojn .....

'4 Al patro kion vi donos ..... Regnon la ĉielan .....

'5 Al panjo kion vi donos ..... Inferturmenton .....

## & Valdemara balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 7482 paŝoj dum 1 horo kaj 24 minutoj.  
Klarigojn (\*) vidu post la strofoj.>

(#: (<1,5:29> /lala sofa fami mifa; sola laso fami;  
lala sofa remi fala; sofa fami mire; (#Rekantaĵe:  
mifa so so; la3la lala lala lala so so; dodo dore  
mi; mifa so so))x258 )+

(&:

### ,& Unua parto. Devenoj (10'):

'1 /Venu jam kunigi nin ; en  
ĉendancon feroan\* ; ĉar ni  
historion konu ; kaj fieru  
heroan.

(×:; **Kantu forte ; frape paŝu  
dancon kaj ridetu ; belas nova  
tag' ; kantu forte.**)

'2 Nun aŭskultu jen baladon ;  
belan mi rakontos ; pri sinjoro  
kuraĝa kiu ; duran devon  
frontos. ....

'3 En Francujo hugenotojn\* ;  
reĝo persekutis. ; Fuĝis  
Langleoj de l' despoto ; kaj  
ekzilon salutis. ....

'4 En Svedujo poste loĝis ; bona  
arĥitekto ; ĉar lia prapatro fuĝis  
; tien vivprotektan. ....

'5 Verkis fabelojn por infanoj ;  
kaj instruajn librojn ; fraŭlino  
Matilda\* kun elano ; voĉis  
amajn vibrojn. ....

'6 "En Sudermanlando\* vivas ;  
arĥitekto sperta. ; Estrajn  
domojn kaj preĝejojn ; li  
konstruis lerta. ....

'7 Por norvega parlamento ;  
Emil\* desegnis domon. ; Plu  
famigis teatrejo ; Dramen lian  
nomon." ....

'8 "Svaton jesu, edziniĝu ; al  
sinjoro Langleo ; ne pro riĉo kaj  
prestiĝo ; sed familia kreo." ....

'9 El bieno\* post la nupto ;  
hejmon faris ili ; vivis honeste  
sen korupto ; kvar ŝi naskis  
filojn. ....

'10 Frato Filip\* inĝeniero ; kun  
Nobel' laboris ; poste pri  
konstruteĥniko ; Stokholme  
profesoris. ....

'11 Frato Abrahamo\* ĥemion ;  
diligente studis. ; Profesoro  
heliuman ; pezon li konkludis.  
.....

'12 Frato Aleksandro\* artisto ;  
rajdi ĉevalon ŝatis ; pentris  
mondon de ekzisto ; povas mi  
konstati. ....

'13 Valdemar'\* plej juna filo ;  
de Emil kaj Matilda ; kreskis  
intelekte brila ; en homamo  
milda. ....

'14 En Polujo judo juna\* ; kreis  
novan lingvon. ; Varsovie li  
eldonis ; per doto tiun atingon.  
.....

'15 Libron cenzuristo rigardis ;  
en tempo de siringoj ; en la  
rusa, pola, germana ; franca kaj  
angla lingvoj. ....

'16 Unuan libron li al homoj ;  
diverslanden sendis ; kaj  
reagojn de ranguloj ; kun espero  
atendis. ....

'17 Lernis verkisto Tolstoj dum  
horo ; la gramatikon tute ; kaj  
post studo duhora ankoraŭ ;  
komprenis absolute. ....

'18 Dekkvinjara Antonina\* ;  
Esperanton lernis ; ĉar ne volis  
venkon finan ; atendi ĝis eterne.  
.....

'19 Skribis ŝi leteron kaj ; al  
Zamenhofo sendis. ; Lin  
kortuŝis vortoj ŝiaj. ; Bone  
respondendis. ....

'20 "En Simferopolo instruas ;  
mi ĝin al kamaradoj. ; Pensoj  
homaranaj influas ; dum la  
lingva studado. ....

'21 Ni nun esperanton kune ;  
ku2n ĝojo lernas. ; Volas  
generacio juna ; vivi mondon  
modernan." ....

'22 Venis vortoj de la majstro ;  
ankaŭ al Upsalo. ; Otto\*  
ordiniĝis pastro ; en la  
katedralo. ....

'23 "Valdemaro, ho studanto ;  
de l' universitato\* ; lingvon  
rigardu Esperanton ; certe vi ĝin  
ekŝatos." ....

'24 Valdemar' kaj Otto Zejdlico  
; studis la novan lingvon. ; Ĉiu  
poste en sia ofico ; bone sin  
distingos. ....

'25 Ili societon faris\* ; por  
lingvo Esperanto. ; elektiĝis  
Valdemaro ; ĝia prezidanto. ....

'26 Ludoviko pensas pri ;  
homara paca pado: ; "Ĉu la  
lingvo internacia ; fariĝos  
monda movado? ....

'27 Mondolingvo Volapuko\* ;  
perdas da prestiĝo. ; decidis  
Nurenberga klubo ;  
esperantistiĝi\*. ....

'28 Volapukon trafis jam ;  
forlaso kaj disfalo. ; Klubon  
esperantan fondis ; junuloj en  
Upsalo. ....

'29 Dua klubo kaj unua ; por  
nur Esperanto, ; estu lumo por  
movado ; monde malgiganta."  
.....

'30 "Kara mia edzo, vi ; ne estu  
maltrankvila. ; Vian lingvon  
lernas jam ; anaro tuj  
multmila." .....

'31 De Valdemara balado nun ;  
jen parton la unuan ; finas ni  
sed dancos kune ; baldaŭ\* la  
parton duan. ....

### **,& Dua parto. Ruslandon (17'):**

'32 Jen Valdemaran parton duan  
; kantos mi al vi tu2j. ;  
Valdemaro renkontis fruajn ;  
espojn en Rusu2j'. ....

'33 "Esperantistoj al Jalto  
venu!" ; anoncis Ilja  
Ostrovski\*. ; Pra-Pasportan  
Servon jenan ; devas mi  
agnoski. ....

'34 "En La Esperantisto\*  
amikojn ; lingvajn iu invitis" ;  
diris Valdemar' al Eriko\* ; "iru  
ni viziti. ....

'35 Kun kamaradoj mi jam  
fondis ; esperantoklubon. ;  
Tempas pri uzeblo respondi ;  
kaj forigi dubon. ....

'37 "Rusoj al Svedujo estas ;  
hereda malamiko" ; diris Eriko,  
"Ĉu atesti ; tion en praktiko?"  
.....

'38 "Malamikojn ĉu vi diru ; sed  
jen amikaro" ; diris Valdemaro,  
"Iru ; ni al Nigra Maro! .....

'36 Planu ni vojaĝon kune ;  
trans la maro balta ; ek de  
Sankta Peterburgo ; ĝis la urbo  
Jalta." .....

'39 Iris ek sur longa vojaĝo ; du  
studantoj svedaj ; pro krimea  
espa mesaĝo ; amikecon kreda.  
.....

'40 Tra Finnlando li biciklis ;  
Sanktan Peterburgon. ;  
Esperanta parolo tiklis ; kun  
viro\* en tiu urbo. ....

'41 Esperanton Erik ne sciis ;  
eke ne parolis. ; Dum veturo  
lernis li ; ĉar komuniki volis.  
.....

'42 Ili veturis per fervojo, ;  
Moskvon rapidis ; gastis faman  
Lev Tolstojon\*. ; Lokaj espjoj\*  
gvidis. ....

'43 Militon kaj pacon\* diskutis ; kaj cenzuron baran. ; "La Regno de Dio estas ene ; de vi,\* miaj karaj. ....

'44 Donu preter egoismo ; spacon al la amo ; kiel fortojn adicias; paralelogramo.\*" ....

'45 Valdemar' dankemas ĝoja ; pro la granda saĝo ; kiun dividis jen Tolstojo ; kaj kontente mesaĝas. ....

'46 "En Rusujo kun amikoj ; ni spertas unuan fojon ; internacian lingvaplakon ; poste daŭrigos vojon. ....

'47 Al Krimeo suna hastos ; ni trans montan alton ; ĉe Ilja Ostrovski gastos ; maran urbon Jalton." ....

'48 Antoninan Ilja vokis ; "Venu al gastoj montri ; la plej belajn krimeajn lokojn ; kaj al ili rakonti\*." ....

'49 En Krimeo kunestadon; ĝuas tri semajnojn. ; Ĝis daŭrigas ili padon ; lingvofluon gajnos. ....

'50 De Sevastopolo ŝipiras\* ; ili konatan adreson ; de esperanta pioniro ; Borovko\* en Odeso. ....

'51 Estis Nikolao la sama ; kiu el Varsovio ; ricevis la respondon faman\* ; pri Esperanthistorio. ....

'52 Li kaj Antonina jam gvidis ; internacian voĉdonon\* ; kiun Odesa klubo decidis ; pri reformpropono. ....

'53 Dankis pro tio Zamenhof' ; ke ili grave agis ; lin, estontan teozofon ; kaj ŝin, kiu ĉion pagis. ....

'54 Ĉiĉeronis Antonina ; kaj sen ajna dubo ; bone reprezentis sian ; esperantoklubon. ....

'55 "Valdemar', mi vidas ke ; vi ja ne estas danda. ; Eltriviĝis viaj ŝuoj ; pro paŝado planda." ....

'56 "Kun vi kara Antonina;urbon ni promenis. ; Multon interesan vidis ; ne piedojn trenis." ....

'57 Nikolaon Bo2rovkon; edziniĝis poste ; Antonina Ĉaikovska. ; Nupton ĝoju toste! ....

'58 En Odeso Valdemaro ; kun Vladimir Gerneto\* ; akordiĝis pri refaro ; de monata gazeto. ....

'59 "Ĉesis jam La Esperantisto ;  
ĉar mono mankas. ; Da  
abonantoj longa listo ; novan  
eldonon dankus. ....

'60 Ĝi de Tolstoj publikigis\* ;  
verkon Prudento kaj kredo ; kio  
cenzuron caran instigis ; ordoni  
ke ĝi cedu. ....

'61 Rusa cenzuro esperanton ;  
eldoni malpermesis ; sed  
revuon en bona kvanto ; svedoj  
povus presi. ....

'62 Gazeton Lingvo Internacia ;  
parte mi financos. ; Preso estu  
tasko via ; jen nia alianco. ....

'63 Per leteroj mi redaktos ;  
esperantogazeton. ; Eldonadon  
vi pritraktu ; ĝis dissendo  
pretos." ....

'64 "Gazeton Lingvo Internacia  
; presos mi kaj eldonos" ; diris  
Valdemar', "kaj mi ; amikojn  
helpajn konas. ....

'65 Tiel glate ni evitos ; caran la  
cenzuron ; kaj forumon faros  
meritan ; por la nova kulturo."  
.....

'66 Ŝipon ili al Istanbulo ; serĉis  
el Odeso ; sed ŝipestrojn  
ebriulojn\* ; volis tuj forgesi. ....

'67 Erik al maristo parolas ;  
"Serĉas ni ŝipon ; iri  
Konstantinopolon. ; Ĉu per via  
skipo?" ....

'68 "Nia ŝipestro kuŝas plankon  
; eĉ ne povas stari. ; Brando ne  
estas lia manko" ; maristo  
fideklaris. ....

'69 Venis per rusa vaporŝipo ;  
Konstantinopolon. ; Ĉe  
Bosporo brilis urbaj ; turoj sur  
markolon. ....

'70 Aĥmed Paŝa\* ilin gastigis ;  
ridis rondaventra. ; Grand-  
sinjoro de l' kortego ; montris  
kion li pentras. ....

'71 De l' maro laŭ Danuba  
Rivero ; ili du pluiris, ; preter  
ĝia Pordo Fera ; montojn  
verdajn miris. ....

'72 "Restu pli longe en  
Hungarujo!" ; Valdemaro  
proponis ; "Ne, ni hejmen iru  
tuje!" ; Erik lin admonis. ....

'73 "Budapeŝto min ravas plu!"  
; Valdemaro vokis. ; "Via  
monujo havas truon!" ; lin  
Eriko mokis. ....

'74 El Upsalo venas gazeto ;  
Lingvo Internacia. ; En la tuta  
mondo aperas ; neniu alia. ....

'75 Sur sin tiun taskon prenis ;  
Valdemar' Langle' ; doktoro  
Krikorc, Pol Nilen' ; kaj Alberj  
por ekspedo\*. ....



'76 Kvar klubanoj fondis ĝin ;  
kaj poste ili produktis ; dum  
kvar jaroj magazinon ; kiu  
lingve fruktis. ....

'77 Gazeton redaktas Vladimiro  
; de distanco granda. ; Poŝti ĝin  
klubanoj iras ; por homoj  
diverslandaj. ....

'78 Nikolao trovis lokon ; en  
Sankta Peterburgo .  
'78 Transiunigis paŭl boŝovko , de  
lando de la sturgo. ....

'79 Al ili la revuon ; poŝto  
pakaĵe liveris. ; La Rusujan  
distribuon ; ili letere peris. ....

'80 Valdemaro pionira ; estas  
esperantisto ; kaj per spertoj li  
fariĝos ; bona ĵurnalisto. ....

'81 Valdemaran baladon ni jam  
; finas parton duan ; kaj ni ĝian  
parton trian ; baldaŭ dancu  
bruan. ....

### **,& Tria parto. Revojaĝe (15'):**

'82 Nun de Valdemara balado ;  
kantos mi parton trian ; pri lia  
vojaĝado ; en mondo nia. ....

'83 Al Rusujo rean fojon\* ;  
Valdemar' sopiras. ; Sanktan  
Peterburgan vojon ; li somere  
iras.

'84 Bonvenigis geborovkoj. ;  
En ŝia utero ; jam embriis\*  
Valdemara ; venonta amespero.  
.....

'85 Ĝojis Antonina kara ; kaj en  
ŝia sino ; kreskis jam por  
Valdemar' ; estonta dua edzino.  
.....

'86 "Aleksandro, frato mia ; vi  
ĉi tie restis. ; Ĉu Nobela  
ekspozicio\* ; tre sukcesa estis?"  
.....

'87 "Jes, mi la ornamojn faris ;  
pagon ricevis tu2j. ; Antonina la  
monon ŝparis ; ni iru al  
Italu2j'\*. " ....

'88 Post Rusujo Budapeŝten ;  
venis Valdemaro ; vidi grandan  
ekspozicion ; de hungara  
miljaro\*. ....

'89 Li en Lingvo Internacia ;  
skribas artikolojn ; espe pri  
vojaĝoj siaj ; kaj amikaj  
paroloj. ....

'90 Al Rusujo trian fojon ;  
Valdemar' sopiras. ; Sanktan  
Peterburgan vojon ; li somere  
iras\*.

'91 Por li stampis la sveda  
konsulo ; rekomendan leteron. ;  
"Al ĉi tiu bona junulo ; fidu en  
aferoj." ....

'92 Li veturis per fervojo ; inter kamparanoj ; viziti grafon Lev Tolstojon ; en Jasnaja Poljana\* .

.....

'93 Devis ŝanĝi vagonaron ; li en urbo Tula ; ĉe preĝejo renkontis paron ; povran ĉifonulan. ....

'94 Lev lin bonvenigis kore ; en sia vilaĝo ; kaj dividis kaj palacon ; kaj profundan saĝon.

.....

'95 Demandis li de Lev moralon ; post malvenko ŝaka\* : ; "Kiel ĝuste agi sen falo ; en malĥristan vakon? ....

'96 Mizerulan paron renkontis ; mi ĉe preĝejo dorman. ; Riĉa mi junulo hontis ; pri almozo norma." ....

97 Lev respondis kun okuloj ; fajrobribe viglaj ; "Ni ne kapablas vivi sanktule ; tio vivon siglas." ....

'98 Sergej Aleksandroviĉ' ; tatara ĥana pranepo\* ; helpon al Valdemar' dediĉis ; sur kozaka stepo. ....

'99 Juĝisto Dmitri Ivaniĉ'\* ; kaj vilaĝa atamano\* ; trovis por li taŭgajn kondiĉojn ; ĉe Filonovskajanoj\* . ....

'100 Kun kozakoj vivi li volis ; en maleleganto. ; Kun Sergej' kaj Dmitri parolis ; nur en esperanto. ....

'101 Pluge, rikolte, draŝe laboris ; li ĉe kozakoj\* pene. ; Supon kaj nigran panon voris ; vekiĝis frumatene. ....

'102 Rusan stepon sur ĉevalo ; Valdemar' vojaĝos ; post restado radikala ; en kozaka vilaĝo. ....

'103 Sur ĉevalo Zakaulok ; rajdis li horizonten. ; Rusan kamparanan gastamon ; ĉie li renkontis. ....

'104 Sur Zakaulok rajdis al nordo ; li dum sunis kaj blovis ; kaj ĉe ĉiu kampula pordo ; koran gastamon trovis. ....

'105 Kampulojn, amikojn kaj princinojn ; gastis li sur vojo. ; Post riveroj kaj ravinoj ; revenis al Tolstojo. ....

'106 "En mia dudekkvina jaro" ; diris Valdemaro ; "rajdis mi kozakan ĉevalon ; ĝis Balta Maro. ....

'107 Mi dum iro spertis pravon ; ke stampita letero ; al oficulo pruvas gravon ; de bezona afero." ....

- '108 Jarcentfinon esperanta ; unua edziĝo vestas. ; Signe Blumberj\* el Akvelando\* ; kaj Valdemaro festas. ....
- '109 "Mielmonate ni vojaĝu ; foran Samarkandon. ; Rusa registaro omaĝon ; donos tra la lando. ....
- '110 Pro letero de reĝo Oskaro\* ; nia grupo disponos ; tra imperio de rusa caro ; mem fervojvagonon. ....
- '111 Vi nin sekvu en vojaĝo ; frato Aleksandro. ; Bildojn pentru de vilaĝoj ; kaj riveraj meandroj." ....
- '112 Signe al li naskis filojn ; bele sane kreskis ; juna Lars kaj aĝa Emilo\* ; bone adoleskis. ....
- '113 En la granda imperio ; de la rusa caro ; fermentiĝas revolucio ; en la laboristaro. ....
- '114 Valdemaro ĝin atestis ; en aparta libro\* ; kiel popolon trupoj molestis ; murde per kalibroj. ....
- '115 "Se maltaŭga registaro ; civitanojn murdas ; al iliaj pledaj deklaroj ; oni restu surda." ....
- '116 Fondon de sveda esperanto;federacio gvidis ; Valdemaro kaj sen vanto ; poste ĝin prezidis\*. ....
- '117 Verkis Valdemaro pri ; milito en Balkano\*. ; Por la monda katastrofo ; estis ĝi la ĉano. ....
- '118 En la mondmilito logis ; Finnlandon liberiĝi. ; Ilin Valdemar' apogis ; kampanjis li prestiĝe. ....
- '119 Dum la rusa revolucio ; al finnoj libero venis. ; Valdemaro helpis tion ; kaj ricevis ordenon\*. ....
- '120 Trian jaron de la paco ; mortis lia Signe. ; Vivo estas nur donaco. ; Enteriĝis digne. ....
- '121 Valdemaro al Rusujo ; ĵurnaliste iras\*. ; Antoninan li renkontas ; ŝi problemojn diras. ....
- '122 "Kara mia Nikolao ; patro ilia mortis ; kiu al ni vivsekuron ; kaj monon hejmen portis. ....
- '123 Ĉu vi povas al Svedujo ; mian filinon preni ; ke mi povu la aliajn ; sola en vivo teni?"
- '124 "Nina venu al Stokholmo ; plu muzikon studi. ; Ĉe mi", diris Valdemaro ; "povos pianon ludi." ....

'125 Enamiĝis Valdemaro ; kaj la juna Nina. ; Ŝi fariĝis post du jaroj ; lia novedzino\*. .....

'126 Mi la trian parton nun ; rakontis Valdemaran ; kaj ni poste dancu kune ; ankaŭ la parton kvaran. ....

**,& Kvara parto.  
Hungarlandon (15'):**

'127 Nun mi kantos kvaran parton ; pri Valdemar' kaj Nina. ; Mondo tre malbone fartos ; pro malamo kulmina. ....

'128 Lernis Esperanton frue; Valdemar' kaj regis. ; Li dek unu lingvojn flue ; kaj parolis kaj legis. ....

'129 Germanujon humiligis ; la venkintoj militaj ; kio kontraŭreagon instigis ; civilizon spitan. ....

'130 Eĉ pli Hungarujon rabis ; paco Trianona. ; Restis por miljara nabo ; lando nur triona\*. ....

'131 Rajdis Valdemar' ĉevalon ; tra hungara lando\* ; por ekkoni ĝin pli bone ; ol de fervojrando. ....

'132 En sia kvindeknaŭa jaro ; rajdis Valdemaro ; puston longe sur ĉevalo ; tra lando de hungaroj. ....

'133 Ekinstruis li svedan lingvon ; en universitato\* ; kaj studantojn judajn ŝirmis ; kontraŭ rasismaj batoj. ....

'134 Li en Budapeŝto laboras ; en lingva fakultato ; kaj rimarkas ĉe ĥristanoj ; mankon de kompatato. ....

'135 Post verkado, tradukado ; kaj kontakta kreo ; fariĝis li de l' ambasado ; kultura ataŝeo\*. ....

'136 Adolf Hitler\* sen skrupuloj ; homojn tre malamas. ; Kontraŭ judoj, maldekstruloj ; amasparoloj flamas: ....

'137 "Judoj kaj ciganoj estas ; senvaloraj rasoj. ; El ili neniu restu ; pace ni ne lasu. ....

'138 Al ni arjoj\* ankaŭ slava ; raso malsuperas. ; Jes, la onidiroj pravas ; ili ne prosperos." ....

'139 Nazia partio sen kompatato ; homojn malestimas. ; Judoj, slavo, demokratoj ; regon ilian timas. ....

'140 Pli da teritorio postulas ; nazia retoriko. ; Libro, brulas, kapoj rulas ; antaŭ la svastiko\*. ....

'141 Polojn Germanujo atakas\*  
; grakas generaloj. ; Dua  
mondmilito diskrakas ; landojn  
al bataloj. ....

'142 "Diplomatoj sovetaj  
foriru!" ; Hungarujo postulas. ;  
Valdemar' eskortis ilin ; sekure  
ĝis Istanbulo. ....

'143 Hungarujo sendas trupojn ;  
lukti kontraŭ rusoj ; por eviti  
germanan okupon ; kiel  
aŭstroj\* ĵuse. ....

'144 Stalingradon germanoj  
tuŝas ; en batalo\* decida. ; Ilin  
de tie rusoj repuŝas ; okcidenten  
rapide. ....

'145 Martan tagon la nazioj ;  
faras hungare puĉon\*. ;  
Valdemaro vidas defion ;  
"Komenciĝos buĉo." ....

'146 Valdemaro kaj Per Anger\*  
; en ambasado sveda ;  
antaŭvidis regi sange ; nazia  
murdobsedo. ....

'147 "Adolf Ajhmann\* el  
Germanujo ; venis forigon  
gvidi. ; Judojn li kolektas tuje ;  
sendos al perfido. ....

'148 Judojn for nazioj portas ;  
en tro malgranda spaco. ; En  
vagonoj centoj mortas ; pro  
premiĝo kaj laco. ....

'149 Mi ne mem atestis tion ;  
sed aliaj vidis ; kaj al ni  
rakontis ĉion. ; Dume neniu  
ridis. ....

'150 Al mi estis granda ŝoko" ;  
diris Valdemaro ; "Eĉ por turni  
sin mankas loko ; en malluma  
staro. ....

'151 Al mi estis forta skuo" ;  
diris Valdemaro ; "Eĉ por turni  
sin mankas truo ; en la densa  
staro. ....

'152 Malantaŭ ŝlositaj klinkoj ;  
en kunpremo merda ; plurajn  
tagojn eĉ sen trinko ; multaj  
prudenton perdas. ....

'153 Ĉu ni povas helpi homojn ;  
resti en sekuro ; kaŝi sin en  
ŝirmaj domoj ; for de sanga  
spuro?" ....

'154 "Mi pasporton doni povas ;  
se iu rilaton ; por si al Svedujo  
trovas ; ankaŭ nur privatan." ....

'155 Al Per Anger Valdemaro ;  
respondas per informo. ;  
"Necesas nun vivsava faro ;  
ekster kutima normo. ....

'156 Karlo Luc\* en ambasado ;  
svisa simile faras. ; Registaron  
li persvadis. ; Kartoj arestojn  
baras. ....

'157 Kaŝas li homojn de arestoj ; en eksa fabriko vitra ; ŝirmas ilin de molestoj ; kaj mortigoj arbitraj. ....

'158 Kaj mi tiel same faros ; kvankam kontraŭ juro. ; Homojn kaŝi ni preparos ; inter amikaj muroj." ....

'159 Diris Per aserton pravan ; "Helpu, jes, per domoj ; rajton vivi ĉiuj havas; homoj estas homoj." ....

'160 "Homoj estas homoj, ĉiuj ; havu rajton vivi" ; diris Per, "Vi helpu al tiuj ; provu ni intensive. ....

'161 Certe ni ne povos ĉiujn ; savi de pereco" ; diris Per, "sed helpu tiujn ; provu per ĉiu ideo." ....

'162 Sagokrucanoj\* homojn ĝenas ; akre kaj minace. ; Valdemar' kaj Nina penas ; aŭdace kaj senlace. ....



Bundesarchiv, Bild 1011-680-8285A-25  
Foto: Faupel | Oktober 1944

'163 Valdemar' maljuna bravas ; kontraŭ ili kuraĝi. ; "Ili ne igu mortigejen ; homojn alvojaĝi." ....

'164 En sia sepdekdua jaro ; en ombro de milito ; taskon sur sin Valdemaro ; prenas teruron spiti. ....

'165 Valdemar' kaj Nina Langleo ; kaŝas multajn homojn ; ĉe amikoj malobee ; en privataj domoj. ....

'166 Helpas homoj al la paro ; en la savaj agoj. ; Multaj homoj ordinaraj ; laboras ja sen pago. ....

'167 Kelkajn kaŝas ĉe monaĥojn ; kelkajn en lernejoj. ; Ilin flegas kaj prizorgas ; kiom eblas pleje. ....

'168 Savoreta transporta servo ; havas eĉ ŝarĝaŭton ; kaj kampare manĝaĵrezervon ; ne priparolu laŭte. ....

'169 Per hungara amikaro ;  
judojn save kaŝas ; ili kaj ĉion  
eblan faras. ; Morto strate  
paŝas. ....

'170 Nun de balado Valdemara  
; kaj pri brava Nina ; finas ni la  
parton kvaran ; kaj tuj dancu  
kvinan. ....

### **,& Kvina parto. Ruĝakruce (16'):**

'171 Finis ni la parton kvaran ;  
kaj nun ekas kvinan. ; Alparolis  
Valdemaron ; lia edzino Nina.  
.....

'172 "Grafo Folke Bernadot"\*  
novas ; en Ruĝakruca estraro. ;  
Ĉu ni lin interesi povas ; veni ĉe  
hungarojn?" .....

'173 "Kara Nina, bona ideo" ;  
Valdemar' respondis ; " li estos  
brila korifeo ; Ruĝan Krucon  
fondi." .....

'174 Eksterlandan ministerion ;  
Valdemar' entretis ; ĝeneralan  
sekretarion\* ; li renkonti petis.  
.....

'175 "Grafon akceptu  
Bernadoton. ; Helplaboro  
gravas ; Ruĝa Kruco Sveda  
fondota ; urĝe homojn savos."  
.....

'176 "Ne ricevus li permeson ;  
tra Germanujo veni ; sed mi  
pensas ke sukcesos ; vi la  
gvidon preni." .....

'177 "Tamen Ruĝan Krucon ĉu  
mi ; ankaŭ reprezentos ; por al  
homoj helpi dume ; en militaj  
turmentoj? .....

'178 Ruĝan Krucon certe mi do  
; urĝe organizos ; por al homoj  
kun rapido ; doni vivprovizojn."  
.....

'179 Sur maljunajn ŝultrojn  
prenas ; Valdemar' la gvidon. ;  
Tio sagokrucanojn ĝenas. ;  
Planas ili perfidon.

'180 Sagokruco kaŝejojn serĉas  
; por fuĝantojn trovi. ; Kaptatoj  
multajn larmojn verŝas ; ĉar sin  
kaŝi ne povis. ....

'181 "Homojn la nazioj kaptas ;  
estas granda krizo. ; Kara Nina,  
ni adaptu ; nian organizon. ....

'182 Ĉi leterojn ni eldonu ;  
kvazaŭ fotan pasporton. ; Povas  
ĝi protekti homon ; kontraŭ  
bruta morto. ....

'183 Homon savos tia ĉi ; letero  
de protekto. ; Sagokrucano ne  
kuraĝos ; tiun jam difekti. ....

'184 Montris vojon Karlo Luco  
; kiel deportojn eviti. ; Fridriĥ  
Born\* de Ruĝa Kruco ; age lin  
imitis. ....

'185 Konstantino Karadja\*  
rumano ; Anĥel Sanz-Briz\*  
hispano ; Anĥel Rotta\* de  
Vatikano ; laboras kun sama  
plano. ....

'186 Jeson al kvarcent  
protektleteroj ; aŭtoritato donas  
; kvankam eskapi de danĝeroj ;  
multaj pli bezonas. ....

'187 Oficeje stampu paperojn ;  
kiel vivsavilojn. ; Ruĝakrucajn  
protektleterojn ; havu multaj  
miloj. ....

'188 Al uniformulo ĝi ;  
imponos per bela stampo. ; Ĉu  
ĝi vere validas, tion ; kaŝu inter  
krampoj. ....

'189 Oni dokumentojn  
respektos ; de Ruĝa Kruco  
Sveda ; juran bazon ne  
suspektos ; kaj arestojn cedos."  
.....

'190 Sagokrucanoj leterojn  
grumblas ; de Ruĝa Kruco  
Sveda ; sed ne scias ke juro  
stumblas ; ilin validaj kredas.  
.....

'191 Karlo Luc, Anĝelo Rotta ;  
Konstantino Karadja ; kaj  
Valdemaro judojn kvotas ; eviti  
regon sovaĝan. ....

'192 Helpis al Anĥel Ĝorgo  
Perlaska\* ; post la puĉo dua ;  
por ke protekto ne fiasku ; en  
batalo brua. ....

'193 Koncentrejon Birkenaŭon ;  
du kaptitoj fuĝis. ; Ili raporton\*  
verkis baldaŭ ; kies mesaĝo  
muĝos. ....

'194 Ĉasis ilin la nazioj ; veron  
por estingi. ; Tamen hungarajn  
judajn estrojn; tiu raporto  
atingis. ....

'195 Juda kontraŭstara ligo ;  
volis ne paroli ; pri timiga  
koleriga ; aŭŝvicprotokolo. ....

'196 Budapeŝta judestro\* vokas  
; "Legu jen raporton! ; Adolf  
homvaloron mokas ; puŝas nin  
en morton. ....

'197 En la koncentrejo nazioj ;  
judojn amase gasas ; milojn  
mortigas pro nenio ; vivi neniun  
lasas." ....

'198 "Montru!" Valdemaro diris  
; "Jen do la fina flanko. ; Pri la  
judaj sortoj ni miris. ; Nun ni  
scias, dankon. ....

'199 Ĉi raporton mi tradukos ;  
kaj al reĝo sendos. ; Gustav\*  
estas mia amiko. ; Ni reagon  
atendu." ....

'200 Sed la sveda  
ambasadestro\* ; ne raporton  
kredis. ; "Elrigardu tra fenestro  
; maleblas tiel procedi. ....



'201 Sesdek mil homojn jam ;  
en majo, ne povas esti. ;  
Demandu al registaro tamen ;  
ĉu oni tion atestis." .....

'202 Valdemar' al oficiro ; petas  
klarigi ombron. ;  
"Ĝeneralstabano, ni miras ; ĉu  
ne troas ĉi nombro?" .....

'203 "Okdek mil homojn ili ;  
jam vagonare forportis. ;  
Ĉiusemajne dudek kvar mil ; pli  
dividas ĉi sorton." .....

'204 Fine Valdemar' sukcesas ;  
sendi la leteron. ; "Ho, Gustavo,  
mi promesas ; ke ĝi diras veron.  
.....

'205 Hajnriĥ Himler\* gvidas en  
regno ; judan finan solvon. ; Ili  
laŭ la granda desegno ; fariĝos  
fumo kaj polvo." .....

'206 Skribis al Horti Mikloŝ  
Gustavo ; Valdemar' transdonis  
; kaj parolis pri hasto grava ; al  
ŝtatestro imponis. ....

'207 "Horti, deportojn  
malpermesu ; el Hungarujo  
judajn ; ke amastransportoj ĉesu  
; kaj mortigoj krudaj." .....

'208 "Bone ke vi al mi venas ;  
kun ĉi reĝa mesaĝo: ; Ĝin mi  
serioze prenas ; kun registara  
engaĝo." .....

'209 Malpermesis registaro ;  
judojn fortransporti ; baldaŭ  
post la Valdemara ; pledo ĉe  
Mikloŝ Horti.

'210 Pro la reĝa telegramo ; de  
Gustavo Kvina ; ili ne sendas  
judojn al flamoj ; en bruligo  
fina. ....

'211 Skribas Valdemar' leteron ;  
al Karlo\* princo. ; "Moŝto,  
helpon konsideru ; kontraŭ  
ekstermo grinca. ....

'212 Por la Ruĝakrucaj pagoj ;  
ni bezonas monon ; kaj pro  
multaj helpaj agoj ; pliajn kvar  
personojn." .....

'213 "Pensas mi, akceptu vi ;  
nespertan ĉi Raulon. ; Per vi  
ambaŭ ja evitos ; multaj homoj  
brulon." .....

'214 Venis Raul Valenberj'\* ;  
ĥaosan Budapeŝton ; kaj  
instruis lin Per Anger ; eluzi  
konsulveŝton. ....

'215 Rajtas Raul fari veran ;  
ambasadpasporton. ; Multajn li  
elskribas, homoj ; do eskapas  
morton. ....

'216 Raul' ricevis multan  
monon ; de judoj en Usono. ;  
Kredis rusoj do ke estis ; li  
usona spiono. ....

'217 Valdemaro de Ruĝa  
Kruco; neniun monon ricevis. ;  
Kunlaborantojn preskaŭ ducent  
; estri sen ĝi li devis. ....

'218 Savas Raulo per pasportoj  
; nur ĉasatajn judojn. ;  
Valdemaro savas ĉiajn ; homojn  
sen ekskludo. ....

'219 Kanto pri Valdemar' kaj  
Nina ; longe jam progresas ;  
jam ni dancis parton kvinan ;  
kaj baldaŭ dancu sesan. ....

**,& Sesa parto. Militfine (13'):**

'220 Faris Valdemar' kaj Nina ;  
savlaboron sukcesan. ; Jam ni  
dancis parton kvinan. ; Venas  
parto sesa. ....

'221 En aŭtuno rusa avanco ;  
Germanujon minacos. ; Horti  
finas aliancon ; kaj proklamas  
pacon. ....

'222 Sagokruco puĉon faras\* ;  
en la sama tago. ; Nun neniu  
rajto staras ; kontraŭ teruragoj.  
.....

'223 Oni malpermesis judojn ;  
eliri el la ghetto ; sed kadavrojn  
en Danubon ; ĉiutage ĵetas. ....

'224 Nina en Monahinejo ; de la  
Sankta Koro ; kun estrino  
Hildegardo ; nokte savlaboras.  
.....

'225 Malfermiĝas pordo subite ;  
"Vivu Salaŝio\*!" ; krias deko da  
plenarmitoj ; kelkaj en ebrio.  
.....

'226 "Ha! Por tiaj paperoj  
malbenaj ; tuta jen fabriko. ; Ni  
judaĉojn ĉiujn prenas. ; Vi vin  
identigu!" ....

'227 Vipas kaj tablon pistole  
martelas ; ili kaj blasfemas ;  
monon kaj ornamaĵojn ŝtelas ;  
monahinoj tremas. ....

'228 Postan tagon ili revenas ;  
serĉante judojn, ; ĉiujn en la  
domo ĝenas ; sed maltrafas la  
trudoj. ....

'229 Sagokrucanoj sen  
uniformo ; murdas en amoko. ;  
Oni ne du noktojn dormu ; en la  
sama loko. ....

'230 Sagokruco Valdemaron ; al  
morto juĝas ; ĉar li vivperein  
baras ; por multaj kiuj fuĝas.  
.....

'231 Sagokruco jam lin ĉasas ;  
kun mortiga celo. ; Valdemar'  
malsana kuŝas ; en malvarma  
kelo\*. ....

'232 Flanken la kurtenon tiras ;  
bruto plenarmita. ; Valdemar'  
rigardas kun ; indiferento spita.  
.....

'233 Bruto lin rigardis zorge ;  
ĝis el iu angulo ; iu diris "Estas  
nur ; malsana maljunulo." .....

'234 Estis lia ŝanco bona ; ke  
razado mankas. ; Lin brutulo ne  
rekonas ; pro la barbo blanka.  
.....

'235 El la kela ĉambro tiu ;  
bruto re eliras. ; "Ĉu Langleon  
trovis vi?" ; brutkamarado  
miras. ....

'236 "Ne, li ne estas tie" ;  
respondis la unua. ; "Ĉu vi  
certas? Mi ne kredas!" ; diris tuj  
la dua. ....

'237 Enrigardis ankaŭ la dua ;  
zorge Valdemaron ; sed ne  
povis identigi ; lin tiu barbaro.  
.....

'238 Enrigardis bruto dua; por  
certecon havi. ; "Mi ne povas  
lin rekoni ; vi do tamen pravis."  
.....

'239 Tiel sub milita vintra ;  
budapeŝta korto ; Valdemar'  
saviĝis de ; la sagokruca morto.  
.....

'240 Malkonate li aspektis ; pro  
vizaĝo barba. ; Tial ne kaptiĝis  
li ; de Morto murde varba. ....

'241 Budapeŝton ĉirkaŭprenis ;  
soveta sieĝo. ; Anoj sagokrucaj  
ĉagrenis ; urbe en la neĝo. ....

'242 Konkeris Budapeŝton ;  
soveta armeo\*. ; Pluvivantojn  
de juda ghetto ; savis de pereo.  
.....

'243 Rodja Malinovskij\*  
malferma ; urbo ĝin deklaris. ;  
Ĉion ajn soldatoj rajtas ; sen  
puno fari. ....

'244 Nina diris "Monahinojn ;  
la soldatoj perfortos. ;  
Ruĝakrucajn vestojn ŝirme ; mi  
al ili portos." .....

'245 Baldaŭ soldatoj rusaj venis  
; tra la doma pordo ; kaj  
komencis virinojn ĝeni ; en  
minaca ordo. ....

'246 Al soldatoj Nina kriis ;  
ruse per forta voĉo ; "Ĉu vi  
helpantojn sindonajn perfortos?  
; Meritas vi riproĉon!" .....

'247 Junaj soldatoj al ŝi  
respondas ; haltis preskaŭ plore  
; "Estimata patrino, ni hontas ;  
nin pardonu elkore!"\* .....

'248 Junaj soldatoj honton  
sentas ; kun okule larmo ;  
"Estimata patrino, ni pentas ;  
nin pardonu en armo!" .....

'249 Raul' ne kredis ke danĝeris  
; por li soveta flanko ; sed ĉe  
rusoj malaperis ; kaj mortis en  
Lubjanko\*. ....

'250 En printempo paco sonis ;  
ĉesis jam pafado. ; Nova  
registaro ordonis ; forlasi  
ambasadon. ....

'251 Paro Langle' Svedujen  
venas ; sen eĉ unu groŝo. ; Sin  
vivteni ili penos ; kun malplena  
poŝo. ....

'252 Libron li verkis, Agoj kaj  
tagoj ; en Budapeŝto\* , kaj  
mendis ; helpon per aŭtora pago  
; kaj Hungarujen sendis. ....

'253 Ĥaason en Budapeŝto\* ;  
libre Nina rakontis ; pri  
danĝeroj tre honeste ; kiel  
homoj volontis. ....

'254 Oficiala rekono mankis ;  
por Valdemar' kaj Nina ; sed  
honore oni dankis ; ĉi heroojn  
fine. ....

'255 Ricevis de Ruĝa Kruco  
medalon\* ; ordenon de Norda  
Stelo\* ; justuloj inter la  
popoloj\* ; deklaris Israelo. ....

'256 Se vi povas pli rakonti ; pri  
Langlea faro ; strofon verku por  
tondronta ; balado Valdemara.  
.....

'257 Jen baladon Valdemaran ;  
kantis mi kaj prave ; kaj la  
lingvon tuthomaran ; kaj  
multajn vivojn\* li savis. ....

'258 Nun mi finas la baladon ;  
veran Valdemaran. ; Lian  
nomon tenu ĉiam ; en memoro  
karan. .... )



## <& Klarigoj al Valdemara balado:

Verkis kaj komponis Martin Strid (2015).

'1 En Feroaj Insuloj travivis ĝis moderna tempo malnova tradicio ĉendanci baladojn.

'3 Hugenotoj estis kalvinistoj, viktimoj de religiaj masakroj, kiuj ekde jaro 1685 amase forlasis Francujon. Cento el ili alvenis al Svedujo.

'5 Mathilda Söderén (1832–1904), eldonisto kaj verkisto.

'6 Svede "Södermanland" aŭ "Sörmland", provinco sveona sudokcidentaŭ Stokholmo.

'7 Emil Viktor Langlet (1824–1898), arĥitekto.

'9 Spetebyhall, bieno en sudermanlanda paroko Lerbo apud Katrineholm'. Nupto estis en 1864.

'10 Filip Langlet (1866–1950), laboris konstruiste ĉe Robert Nobel dum 1890–1893 kaj sekretario ĉe Alfred Nobel 1896–1897 kaj 1899–1937 instruis en Tehnika Altlernejo de Stokholmo.

'11 Abraham Langlet (1868–1936), doktoro pri ĥemio, instruis en Chalmers Tehnika Altlernejo en Gotenburgo 1896–1933. Grafologo.

'12 Alexander Langlet (1870–1953), artisto kaj multjara prezidanto de Gotenburga Artista Klubo.

'13 Valdemar Georg Langlet (1872 decembre 17-an –1960 oktobre 16-a), pionira svedespo kaj ĵurnalisto.

'14 Ludwik Lejzer Zamenhof (1859–1917) eldonis Unuan Libron en 1887.

'18 Antonina Ĉajkovska (1872–1948), pionira rusespo.

'22 Otto Zeidlitz (1860–1943), svedespa multlingvulo, pastrigis en 1888.

'23 V. studis en Upsala universitato dum jaroj 1891–1894.

'25 Upsala Klubo Esperantista fondiĝis en 1891.

'27 Planlingvon Volapük inventis kaj publikigis germana pastro Johann Martin Schleyer en jaro 1879. ; Klubo germane "Nürnberger Weltsprachenverein" en 1888 forlasis Volapukon por Esperanto.

'31 Laŭbezzone anstataŭ la vorton "baldaŭ" vorto "poste", "tuj" aŭ "nun".

'33 Ilja Ostrovski (1855–1910+?), kuracisto, anoncis en monata gazeto La Esperantisto en 1895 bonvenigon en sia domo.

'34 "La Esperantisto", plej unua espa gazeto, eldoniĝis en Nurenbergo, Germanujo, dum jaroj 1889–1895. ; Erik Etzel, kamarado de V. en Upsalo.

'40 Sinjoro W. Waher scipovis paroli nur estone, ruse kaj espe. Kun li V. unuafoje parolis espe sen alia lingvo ebla.

'42 Lev Tolstoj (1828–1910), grafo kaj verkisto ; Inter la moskvaj rusespoj kiuj akompanis la svedojn menciigis nomo Puĉkovski.

'43 Ruse "Vojna i mir", kvar volumoj de Lev Tolstoj 1865–1869 ; "Carstvo Boĵije vnuri vas" 1894, malpermesita de la rusa cenzuro.

'44 Ĉi tiun rezonon de Tolstoj citas V. en "Till häst genom Ryssland" ("Sur ĉevalo tra Rusujo") 1898, sur paĝo 46.

'48 Antonina rakontis krimeajn popolfabelojn, kiujn V. poste publikigis en sveda gazeto.

'50 La vaporŝipo nomiĝis Miĥail. ; Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), instruisto, ĵurnalisto kaj pionira rusespo.

'51 Nikolao Borovko sendis al Z. leteron en 1895(?) demandante kio kondukis Z.on al esp. La respondon Vladimir Gernet el la rusa tradukis en esperanton kaj publikigis en Lingvo Internacia.

'52 Tiu voĉdono okazis en 1894.

'58 Vladimir Gernet (1870–1929), pionira rusespo, ĥemiisto kaj vinberinstitutestro.

- '60 En la dua numero de 1895.
- '66 Du vaporŝipojn ili malelektis pro la drinkemo de ties anglaj ŝipestroj. Ili iris per ŝipo Jekaterina II.
- '70 Ahmed paŝao, membro de Grand-sinjora Kortego de la sultano de Otomana Imperio.
- '75 "Lingvo Internacia" eldoniĝis en Upsalo 1895–1899, poste alilande. Unue faris ĝin V., d-ro Sven E. Krikortz (-1931), Paul Nylén (1870-1958) kaj Per Ahlberg (1864-1945).
- '83 La dua rusa vojaĝo de V. estis en jaro 1896.
- '84 Nina Borovko-Langlet (1896–1988) naskiĝis en aŭgusto baldaŭ post la dua vizito de V.
- '86 Aleks laboris por petrolea ekspozicio de Nobel.
- '87 Poste Aleks kaj V. kune vojaĝis al Polujo, Hungarujo kaj Italujo.
- '88 En Budapeŝto oni festis en jaro 1896 mil jarojn post la "landpreno" de Hungarujo.
- '90 Estis en jaro 1897.
- '92 Jasnaja Poljana ("Luma Kampo"), vilaĝo 180 kilometrojn sudob Moskvo.
- '95 Tiun gravan por li interparolon priskribas V. en sia libro "Till häst genom Ryssland", paĝojn 79–84.
- '98 Sergej Aleksandroviĉ, rekta prapranepo de Ŝahin Ĥan Geraj kaj tronheredunto de Tatarujo Krimea.
- '99 Dmitri Ivaniĉ, vilaĝa paca juĝisto en Filonovskaja en 1897. ; La atamano, tio estas kozaka estro, nomiĝis Pugaĉev ; Filonovskaja, vilaĝo en Don-kozaka regiono, 680 kilometrojn sudorientob Moskvo.
- '101 En Filonovskaja V. loĝis kun la familio de Pavl Stepaniĉ Fokin kaj liaj edzino Marja Varfolomejevna, filino Ŝurenka, fileto Ivan, patrino Olga Markovna, fratino Dunja, bofrato Avrelian kaj ilia dekkvinjara filino Vanda.
- '108 Signe Paulina Blomberg (1876-1921), flegistino, filino de Karl Evert Blomberg kaj Paulina Grosskopf, edziniĝis al V. en sia hejmurbo Åbo (suome Turku), Finnlando, tiama Rusujo, en 1899. ; Akvelando (svede Åland, suome Ahvenanmaa), insulara provinco finnlanda kaj svedlingva en Balta Maro.
- '110 Oscar Dua (1829–1907), reĝo de Svedujo 1872–1907 kaj de Norvegujo 1872–1905.
- '112 Emil Langlet (1900–1966), Lars Langlet (1903–1981).
- '114 Svede "Om revolutionsrörelsen i Ryssland" ("Pri la revolucia movado en Rusujo") 1906, pri jaro 1905.
- '116 Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. V. estis ĝia prezidanto ĝis 1909.
- '117 Svede "Om kriget på Balkan" ("Pri la milito en Balkano") 1912.
- '118 Svede "Frihetskorsset av tredje klass", suome "Vapaudenristin ritarikunta", 1918. Finnlando sendependiĝis en 1917.
- '121 V. iris al Moskvo en 1923.
- '125 V. kaj Nina geedziĝis en 1925.
- '130 Laŭ Traktaĵo de Trianono la 4-an de junio 1920 Hungarujo perdis 72 procentojn de sia teritorio kaj 62 procentojn de sia loĝantaro.
- '131 V. rajdis 1000 km-ojn tra Hungarujo en 1931. Svede "Till häst genom Ungern" 1934.
- '133 Ek de 1932 V. instruis la svedan en Pálmány Péter universitato en Budapeŝto.
- '135 V. estis nepagata sveda kultura ataŝeo en Budapeŝto 1938–1944.
- '136 Adolf Hitler (1889–1945), nazia partiestro 1921–1945 kaj diktatoro de Germanujo 1933–1945.
- '138 Arja, el sanskrita vorto por "nobla", nazie signifas ana al la propra (germana) "raso", ĝenerale homo helkolora haŭte, hare kaj okule.

- '140 Svastiko, aŭ hoka kruco, antikva sunsimbolo, uzita por nazia partio.
- '141 Germanujo invadis Polujon en 1939 septembre 1-an.
- '143 Germanujo okupis Aŭstrujon en 1938 marte 12-an.
- '144 Batalo de Stalingrad (antaŭe nomata Caricin, poste Volgograd) daŭris de 1942 aŭguste ĝis 1943 februare.
- '145 Germanoj puĉis Hungarujon 1944 marte 19-an.
- '146 Per Anger (1913–2002), sveda diplomato.
- '147 Adolf Eichmann (1906–1962), alta oficiro de nazia polico Schutzstaffel.
- '156 Carl Lutz (1895–1975), svisa diplomato.
- '162 Hungare "Nyilaskeresztes Párt – Hungarista Mozgalom", hungara nazieska partio dum 1935–1945.
- '173 Folke Bernadotte (1895–1948), sveda princido kaj grafo. Lin murdis israelanoj en Jerusalemo dum lia pacmisio por Unuiĝintaj Nacioj.
- '174 La ĝenerala sekretario de la eksterlanda ministerio nomiĝis Arnóthy-Jungert.
- '184 Friedrich Born (1903–1963), svisa diplomato, delegito de Internacia Komitato de Ruĝa Kruco de majo 1944 ĝis januaro 1945.
- '185 Constantin Karadja (1889–1950) rumana diplomato ; Ángel Sanz-Briz (1910-1980) hispana diplomato ; Angelo Rotta (1872–1965), apostola nuncio.
- '192 Giorgio Perlasca (1910–1992), itala negocisto.
- '193 Vrba-Wetzlerraporto, 1944 aprile, unu el la "Auschwitz-protokoloj", verkita de eskapintoj de Birkenau, nome Walter Rosenberg alias Rudolf Vrba (1924–2006) kaj Alfréd Wetzler (1918-1988).
- '196 Pinchas Freudiger (Filip fon Frojdiger), ekleziestro kaj membro de Juda Konsilantaro en Budapeŝto.
- '199 Gustaf Kvina (1858–1950), reĝo de Svedujo 1907–1950.
- '200 Ivan Danielson (1880–1963), sveda diplomato.
- '205 Heinrich Himmler (1900–1945), estro de nazia polico Schutzstaffel dum 1929–1945.
- '206 Horthy Miklós (1868–1957), hungara ŝtatestro dum 1920–1944.
- '211 Prins Carl (1861–1951), reĝido de Svedujo, estro de Sveda Ruĝa Kruco 1906-1945.
- '214 Raoul Wallenberg (1912–1947), sveda diplomato.
- '222 Sagokruca puĉo okazis 1944 oktobre 16-an.
- '225 Ferenc Szálasi (-1946), estro de Sagokruca Partio 1932-1946, mortpunita.
- '231 Ĉi epizodon priskribas Björn Runberg en sia libro "Valdemar Langlet – räddare i faran" ("V. L. – savanto en la danĝero") 2000, paĝon 37.
- '242 Soveta armeo prenis Budapeŝton en 1945 januare 16-an.
- '243 Rodion Malinovskij (1898 – 1967), soveta marŝalo kaj ministro pri defendo 1957-1967.
- '247 Pri ĉi epizodo Nina foje parolis, diris Pieter Langlet kaj Monika Langlet-Forsberg, genepoj de V., en 2015 aprile.
- '249 Lubjanko, malliberejo en Moskvo kaj centro de soveta spiona agentejo NKVD, poste nomata KGB. Supozeble tie en 1947 Raul' mortis.
- '252 Svede "Verk och dagar i Budapest" 1946. La monon pro la libro V. uzis por sendi krizan helpon al Hungarujo.
- '253 Svede "Kaos i Budapest" 1982, espa traduko en 2001.
- '255 Svede "Röda Korsets silvermedalj" 1946 ; "Nordstjerneorden" 1949? ; hebree "Hasid Ummot Ha-'Olam", "Jad Vašem" 1965.
- '257 Oni taksas ke la Langlea agado en la militfino savis inter dekmil kaj dudek mil homojn, sed eble pli. >



## & Vi min trompis:

< Rekante 24 el 32 battoj por strofo, entute 224 paŝoj dum 3 minutoj. El ukraina tradukis Semljon Vajnblat.>

(#: <:32> (/Lado Lado mimi redo; Tire Tire fafa mire; (#Rekantaĵe: Lado Lado mimi reldo; mimi miSi LaLa La;; mi mimi soso fami; re rere fami milre; Laldo Lado mimi redo; mimi miSi LaLa La; )x7 )+

(&:

'1 /Diris vi, ke florojn lunde ; ni kolektos tre abunde (×: **Vane mi atendis vi<sup>2n</sup> ; Vi min trompis karulin'!** ; **Do, kara, vi min trompis ; Do, erarigis mi<sup>2n</sup>, ; Do<sup>2</sup>, min vi tian junan ; frenezigis ĝis la fin'.**)

'2 Diris vi, ke ĝuste marde ;  
Kisos mi vin fojojn kvardek.  
.....

'3 Vi promesis, ke merkrede ;  
promenados ni piede. ....

'4 Diris vi, ke ĵaŭde certe ; iros  
ni al la koncerto. ....

'5 Vi asertis, ke vendrede ; ni  
veturos kune slede. ....

'6 Diris vi, ke en sabato ; ni  
remados en boato. ....

'7 Diris vi, ke en dimanĉo ; via  
iĝos mi fianĉo. ....)

